




4\*87.121.

# STARTO

ORGANO DE  
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





# ZLATNÍK

La kooperativo de art-produktado ZLATNÍK /Orafisto/ produktas orajn, juvelaĵojn el materialoj liveritaj de la klientoj. Venu por elektili el la riĉa modelaro en niaj vendejoj dislokitaj en la distriktoj Ostrava, Opava, Frýdek-Místek, Itáviec, Nový Jičín, Brno kaj Přerov.

Por la bezonoj de vasta publiko ni produktas elektitajn sadrajn fornojn kun la povo de kar y kurovatoj, kukolhorloĝojn, har-sekigilojn, faldeblajn turismajn ŝovelilojn, kombil-rikoltojn por truktoj kaj fajfilojn por la drezado de bundoj. La produktaĵojn ni sendas remburse per poŝto.

KOOPERATIVO DE ART - PRODUKTADO

ZLATNÍK

CS-729 12 Ostrava 1, Šmetanovo nám. 7

VD ZNAK Hradec Králové vykupuje  
tyto druhy peří:

peří ze zlatého bažanta

peří z kohouta plymouth-  
Ambrox

peří z perliček

kohoutí závěsy z krku

letky z domácí  
kachny

ločasní peří

z krocana

**ZNAK**

**VÝROBNÍ DRUŽSTVO**  
Pražská 686 \*\* 501 01  
Hradec Králové



Cena peří se stanoví  
po vstupní kontrole ve  
v.d. ZNAK Hradec Králo-  
vé.

Výkupné zasíláme poštou.  
Peří zasílejte na adresu  
ZNAK, výrobní družstvo  
Pražská 686, 501 01  
HRADEC KRÁLOVÉ





SPOLEHLIVÉ SLUŽBY  
MOTORISTŮM  
POSKYTUJÍ  
AUTOOPRAVNY  
VÝROBNÍCH  
DRUŽSTEV



---

M. Malovec:

## PRVNÍ STOVKA...

a co dál?



Letos slavíme sté výročí esperanta. Můžeme být hrdi na to, co se za tu dobu podařilo uskutečnit. Jazyk, který znal původně jen jeden jediný člověk, pronikl do všech světadílů, rozšířil patnáctkrát svou slovní zásobu, propracoval dopodrobna svou mluvnici a své stylistické možnosti. Esperantisté vydali několik desítek tisíc knižních titulů, vydávají kolem 130 periodik, pracují v sedmdesáti esperantských organizacích. A to všechno vesměs z vlastních finančních prostředků, bez vojenského, politického nebo hospodářského nátlaku, jen pouhou silou myšlenky dorozumění a přátelství mezi národy. Těžko bychom hledali lepší důkaz, že to není síla malá, i když není tak rychlá a účinná jako politické prostředky, kterými své postavení udržuje například angličtina. Možná se esperanto angličtině nikdy nevyrovná, ale na světě budou vždycky stamiliony lidí, kteří se anglicky nedomluví dostatečně dobře a pro které plánový jazyk bude mít svůj význam. Proto esperanto není závislé na postavení angličtiny. Je naší povinností připravovat plánový jazyk na úkoly, které ho v budoucnosti čekají.

Esperanto našlo široké uplatnění v mírovém hnutí, v turistice a při zprostředkovávání kulturních hodnot, především díky překladům beletrie. Pouze v odborné literatuře, kromě několika nesmělých pokusů, nehraje prakticky žádnou roli. Nelze se tomu divit, vždyť pracovní využití jazyků je nejtěžší a nejnáročnější. Ovšem také nejdůležitější. Proto se v této oblasti skrývají největší rezervy našeho hnutí a největší naděje dalšího rozvoje. Mírová práce, turistika a umělecká literatura mohou esperanto udržovat při životě, ale využití v odborné literatuře je posune o velký kus kupředu. Proto jsou vyvíjeny snahy, aby esperanto našlo konečně uplatnění i na tomto poli.

Tyto snahy se týkají (nebo by se měly týkat) každého z nás. Všichni se přece živíme nějakou prací a esperanto potřebuje umět hovořit o vaření, zámečnictví a stolařině stejně dobře jako o jaderné fyzice, chemii nebo zemědělství. Mezinárodní jazyk, má-li být hoden toho jména a má-li zastávat tuto funkci, musí se umět vyjadřovat o čemkoliv. Esperantista, který chce nabízet světu esperanto jako mezinárodní dorozumívací prostředek, ale sám se jím nedorozumí ani o své vlastní práci, působí směšně a dělá hnutí pramalou reklamou. Ale takoví jsme v podstatě všichni a zůstaneme takovými, dokud se neprobudíme a nepustíme do práce.

Probudit esperantisty a přimět je k práci je někdy těžší než probudit Sípkovou Růženku po stoletém spánku. V pohádce byl čestný úkol vyhrazen princovi, ale je marné čekat, že nějací jazykoví princové způsobí zázrak v našem hnutí. Vynikající jedinci mohli zpracovat podrobnou mluvnici, sestavit velký všeobecný slovník nebo mistrovsky přeložit klenoty světové literatury, ale dobýt dosud odolávající pevnost odborného vyjadřování mohou jen tisíce prostých vojáků hromadným útokem. Generálové sice musí bitvu řídit, ale pokud

se ostatní budou na ně jen dívat jako dosud, vítězství se neuskuteční. Pracovních oborů jsou tisíce a jejich jazykové zpracování je možné jen jako masová záležitost. Záležitost každého z nás.

Bude nutno vykonat ještě hodně osvětové práce mezi esperantisty, než si uvědomí, jaký by měli v hnutí zaujmout postoj. Stále se setkáváme s nářky, že svaz vydává odborné termináře a publikace (hidraulaj meĥanismoj, komputika vortaro, pri la varmo, terminologia kurso) místo zábavné četby pro začátečníky. Do nekonečna však nelze udržovat esperanto jen na úrovni roku 1887. Těch uplynulých sto let musí být vidět i na našich publikacích a je třeba jít dále. (To samozřejmě neznamená, že by se četba pro začátečníky nemohla vydávat také; ale někdo ji musí připravit a rozhodně nelze vydávat pouze tuto literaturu.) Je pravdou, že odborné publikace a slovníky se hůře prodávají než beletrie, ale není jiné cesty než počítat s pochopením a uvědoměním esperantistů, aby odbornou literaturu podporovali alespon odkupováním vydaných publikací, nechceme-li neustále přešlapovat na místě.

V letošním jubilejním roce UEA zakládá instituci, která se má zabývat přípravou a vydáváním názvosloví a textů z různých oborů a podoborů. Především to znamená zprostředkovat spolupráci lidí, kteří pracují ve stejné profesi. Někteří českoslovenští esperantisté patří k neaktivnějším pracovníkům na tomto poli. U nás také vyšel terminologický kurs od ing. Wernera (za 20 Kčs k dostání ve svazu), z něhož se i lidé, kteří v oblasti terminologie nikdy nepracovali, mohou dozvědět dosti podrobně zásady, podle kterých je nutno při vypracování odborné slovní zásoby postupovat. Tyto zásady by se měly stát součástí "základního vzdělání" každého esperantisty stejně jako znalost samotného esperanta a jeho dějin s literaturou.

Za sto let se změnilo mnoho. Změnilo se esperanto, změnilo se naše hnutí a především se pronikavě změnil svět, do jehož struktury chceme esperanto organicky začlenit. Nemůžeme toho dosáhnout metodami z konce minulého století. Současná situace vyžaduje odpovídající postup i odpovídající sebevzdělávání esperantistů. Alespon těch, kterým jde o věc.

## —POR LA JUBILEA FONDUSO—

Ing. Vl. Ondryáš, Přerov  
A. Karásková, Olomouc  
Ing. Z. Znamínko, Praha  
S. Skrla, Kyjov  
G. Gajdzica, Trinec  
V. Kocián, Bystřice p. Host.  
N. Minářová, Opava  
K. Michelková, Aš  
Prof. J. Tylš, Dolní Radechová

M. Čekal, Děčín 5  
S. Šírová, Turnov  
M. Kučerová, Brno  
J. Pytlík, Bystřice  
F. Szappancsik, Svatoňovice  
T. Folta, Stará Bílá  
Ing. M. Šlechtová, Jaroměř  
M. Werl, Třebíč  
M. Pastrnák, Havířov

J. Populová, Příbram  
 H. Rehošková, Praha 4  
 Ing. J. Pospíšil, Praha 2  
 EK Dukla, Pardubice  
 P. Marek, Aš  
 Dr. J. Svejda, Brezno  
 M. Škaldová, Liblice  
 L. Šaršon, Svitávka  
 A. Štunc, Žloutkovice  
 Ing. O Sýkora, Mělník  
 M. Mojžíšová, Pardubice  
 J. Satková, Vítkov  
 Ing. Y. Picková, Rataje n.S.  
 Dr. Ing. L. Fritsch, České  
 Budějovice  
 M. + L. Hemerkovi, Pardubice  
 F. Polster, Strážnice  
 P. Rípa, Benátky n. Jizerou  
 B. Doležalová, Olomouc  
 L. Mitrengová, Troubelice  
 J. Vala, Ostrava 3  
 H. Pluhařová, Heřmanův Městec  
 Ing. P. Deák, Teplice  
 J. Bouda, Blatná  
 R. Burdová, Třebíč  
 E. Veverka, Miletín  
 A. Mikundová, Pardubice  
 J. Věsecká, Mimon  
 D. Pištěková, Podbořany  
 S. Nesvadba, Modřice u Brna  
 K. + V. Nedomovi, Pardubice  
 M. Maršálková, Ořechov  
 B. Macková, Pardubice  
 K. + M. Francovi, Pardubice  
 J. Sequensová, Praha 2  
 H. Drápalová, Brno  
 L. Ctvrtníček, Brno  
 B. Vlachová, Svitavy  
 A. Bušková, Hradiště  
 O. Křivková, Pardubice  
 M. Húsik, Banská Bystrica  
 V. Líkař, Chelčice  
 L. Kučera, Liberec  
 R. Kybová, Ondřejov  
 J. Kotlan, Předslav  
 M. Jarkovský, Pardubice  
 M. Barton, Hradec Králové  
 E. Fíková, Humpolec  
 P. Brzoska, Stonava  
 M. Kaletová, Olomouc  
 A. Bačák, Budišov  
 P. Linková, Kadan  
 K. Rehosek, Praha 4  
 K. Kubiczek, Třinec  
 A. Vozáková, Slavičín  
 J. Dosáková, Olomouc  
 Z. Kadlečík, Trnava  
 Ing. V. Kočyara, Opava  
 V. Trojan, Zacléř  
 M. Sýkorová, Mělník  
 M. + L. Srbovi, Pardubice  
 J. Hermanová, Praha 8  
 L. Váradi, Stará Paka  
 R. Zbirovský, Střelice u Brna  
 Ing. J. Bednář, Brno  
 M. Milerová, Karlovy Vary  
 B. Rubáčková, Pardubice  
 M. Krausová, Velký Senov  
 M. Pilbauerová, Pardubice  
 M. Stryjová, Frýdek-Místek  
 A. Patočka, Ostrava 3  
 V. Mašita, Stoky  
 Ing. J. Havelka, Brno  
 A. Dvořáčková, Rtyně  
 J. Dokoupilová, Lysice  
 M. Veverková, Miletín  
 M. Štýblová, Pardubice  
 S. Spejzlová, Pardubice  
 P. Zahradník, Klikov  
 J. Sirová, Kamenický Šenov  
 Ing. W. Hebda, Albrechtice  
 A. Hladík, Bory  
 J. Šmrž, Praha 4  
 M. Špinar, Zdár n. Sáz.  
 P. Půlpytel, Suchdol n. Luž.  
 A. Pavlínová-Růžičková, Brno  
 D. Vobrátilová, Praha 7  
 Dr. O. Čech, Svitavy  
 M. Voda, Městečko Trnávka  
 O. Lhoták, Dčín  
 L. Benáková, Staré Sedliště  
 V. Bulka, Kopřivnice  
 L. Panenková, Praha 8  
 A. Solc, Ústí n. L.  
 J. Szmek, Hrádek ve Slezsku  
 M. Lochman, Mělník  
 R. Bildnerová, Volary  
 E. Stenclová, Nymburk  
 J. Kovářová, Humpolec  
 J. Vondroušek, Brno  
 L. Kysilková, Přelouč  
 L. Žeravík, Chvojenec

# J.KÁDÁR al hungaraj esperantistoj

En la nomo de la Centra Komitato de la Hungara Socialisma Laborista Partio kaj ankaŭ persone mi salutas Hungaran Esperanto-Asociacion kaj ĉiujn partoprenantojn de via kongreso festanta la centjarigon de la Esperanto-movado. La ekesto de la lingvo Esperanto kaj dekomence la movado mem reprezentas noblajn homamajn strebadojn: helpi interpopolan proksimigon, pli bonan interkomprenigon kaj pli altan recipokan estimon. La disvastigo de Esperanto en la pasintaj cent jaroj pruvis la ĝustecon de viaj movadaj celoj...

Dum la jardekoj post la liberigo, la aktivado de Hungara Esperanto-Asocio vaste disvolvigis kaj kontribuis al la altiĝo de la monda prestiĝo de nia patrujo. Estas alte taksebla ankaŭ la misio, kiun la asocio plenumas en la diskonigo de la hungara kulturo.

Nun ni vivas en epoko, kiam la servado al ĉiuj ĉi celoj fariĝis pli grava ol iam ajn antaŭe. Ankaŭ via humanisma movado kontribuis al tio, ke la espero, esprimita eĉ en la nomo de la lingvo, fariĝu realo koncerne la pacan estontecon de la homaro, la pacajn interŝtatajn kontaktojn. Pensante pri ĉio ĉi mi elkore gratulas pro la alta distingo donacita de la Prezidio de Hungara Popolrespubliko pro viaj ĝisnunaj rezultoj, kaj mi deziras multe da sukcesoj en la realigo de viaj noblaj celoj.

Kun koraj salutoj

János Kádár  
Ĝenerala sekretario de la  
Hungara Socialisma Laborista  
Partio (el Esperanto, 4/1987)

---

## PACRENKONTIĜO en PARDUBICE

PARDUBICE (ĈTK) - La tritaga internacia renkontiĝo de esperantistoj-pacdefendantoj finiĝis dimanĉe 22.3.1987 en Pardubice. La okan renkontigon partoprenis 260 esperantistoj el Anglio, Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Francio, Hungario, GDR, Pollando kaj ĈSSR. En la orientan Bohemion venis ankaŭ la prezidanto de MEM kaj membro de la Monda Paokonsilio D-ro Imre Pethes el Hungario, la ĝenerala sekretario de MEM kaj membro de MPK Clément Tholet el Belgio kaj ankaŭ pluraj reprezentantoj de nia politika kaj publika vivo.

La partoprenantoj akceptis alvokon al ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo, por ke ili ankoraŭ pli efike uzu Esperanton kaj la movadon por plua proksimiĝo de la popoloj, al intersango de kulturaj valoroj, al aŝirmado de la vivomedio kaj al pliprofundigo de rilatoj inter homoj kun la celo subteni firmigon de pacideoj.

Dum la renkontiĝo la esperantistoj per meto de floroj honorigis la viktimojn de la nazia okupacio en la memorloko Zámeček en Pardubice kaj en la vilaĝo Ležáky, kiur la fasistoj ekstermis antaŭ 45 jaroj.

(Tiu ĉi informon de ĈTK - Ĉeĥoslovaka Inform-Agentejo - publikigis preskaŭ ĉiuj ĉeĥoslovakaj ĵurnaloj, dufoje elsendis ĝin la televido kaj kelkfoje la radio. La alvokon al esperantistoj ni aperigis en la pasinta numero de Staro.)



---

# KOMUNIKO

---

Inter la 12-16-a de aprilo 1987 en Budapeŝto, Hungario, okazis la 20-a Konsultigo de la Rerezentantoj de la Esperanto-Organizaĵoj el la Socialismaj Landoj.

Ĝin partoprenis delegitaroj de la Esperanto-Asocioj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando kaj Sovetio. La partoprenintoj substrekis, ke ĉi tiu kunveno okazas en la jaro de centjariĝo de Esperanto, kiu instigas la esperantistojn labori pli energie por disvastigi la internacian lingvon Esperanton serve al la paco, progreso kaj interkompreniĝo de popoloj.

Samtempe la Konsultigo estas jubilea kunordiga renkontiĝo de la reprezentantoj de la Esperanto-Asocioj el la socialismaj landoj, kiu dum pasintaj 20 jaroj donis gravajn pozitivajn rezultojn.

La ĉeestantoj pridiskutis la rolon de Esperanto en la nuna epoko de la sciencetnika revolucio, socia progreso kaj evoluo. Ili konstatis, ke ekzistas grandaj ebloj pere de Esperanto kontribui al la progresigo, disvastigo kaj utiligo de la sciencoj kaj tekniko.

Estis pritraktata la laboro de la Esperanto-Asocioj de la socialismaj landoj, kiu ankau en la estonto devos daŭri konkorde kun la rezolucioj de UNESKO pri Esperanto.

La partoprenantoj esprimas sian dankon al HEA pro la certigo de bonaj laborkondiĉoj.

Budapeŝto, la 16-an de aprilo 1987.

Dum kvar aprilaj tagoj realiĝis la jubilea Konsultigo de landaj asocioj de socialismaj landoj. Rerezentantoj de sep organizaĵoj por dudeka fojo kunvenis - ĉi foje en Budapeŝto - por intersangi siajn spertojn, kunordigi planojn kaj perspektivojn de la Esperanto-movado en propraj landoj. Nian asocion reprezentis trimembra delegitaro sub gvido de la 1-a vicprezidanto. La tuttagaj traktadoj bone sukcesis, kion pravas la publikigita komuniko.

Sed la ĉeestintoj ne nur laboris, ili havis okazon ĝui ankaŭ plusajn eventojn, kiujn preparis la gastigantoj. Okazis ekz. la akcepto de la gvidantoj de la delegacioj fare de sekretario de la Landa Konsilio de Sindikatoj, kiu informis pri bona kunlaboro de la hungara esperantistaro kun sindikatoj. Tre agrablan vesperon travivis ĉiuj delegitoj en la Centro de Asocio de Agrikulturaj Kooperativoj en la departemento Pest, kiun ĉeestis ankaŭ la departementa sekretario d-ro Gyovai Pál. La ĉi tiea aplikado de Esperanto en la kooperativa movado estas vere modela kaj ni povus multon lerni de niaj najbaroj. Sed la plej emocia el la budapeŝtaj vizitoj estis tiu ce s-ano Karoly Fajszai. Ni ĉiuj kun vera admiro trarigardis lian imponan bibliotekon, kiu nun enhavas pli ol 7000 librojn kaj 3000 binditajn jarkolektojn de gazetoj - ĉio ĉi en Esperanto aŭ pri Esperanto. La biblioteko estas jam bone provizita per katalogoj, havas vastajn kontaktojn kun pluraj bibliotekoj. Okaze de la 100-jariĝo de Esperanto estis parto de tiu kolekto - kiu jam uzas rajton de la ŝtata projekto lau decido de la ministerio de kulturo - ekspoziciita en la Hungara Nacia Biblioteko.

Antaŭ forlaso de Budapeŝto ni ankoraŭ kun ioma envio trarigardis novajn ejojn de HEA, kiu estas vere imponaj.

Vl. Kočvara

## KIO ESTAS RESANIGENDA EN ESPERANTUJO?

Leginte la artikolon en Starto 3/86 - "Komputero" - ĉu jes? - mi decidis priskribi al vi miajn pripensojn pri la afero de la terminara problemo entute.

Lau mia opinio ne estas tiel grave, kiu termino por la komputilo venkos, sed estas vere tre malĝoje, ke ni esperantistoj nun dum la intense revolucia evoĵuo de la moderna kaj kelkjardekojn evoluanta teknika fako ankoraŭ ne scias kiel nomi la ĉefan konsistojn de la tuta aparataro.

Al mi persone ne estas la estonteco de nia lingvo egala, ĉar mi esperantistiĝis kiel dekunujara knabo. Nun mi estas jam 67-jara maljunulo. Kiam mi skribis mian libron "Pri la varmo", mi bone ekonis, kiel grava kaj malfacila estas la terminologia laboro.

Mi estas konvinkita, ke nia kara lingvo estas kapabla fariĝi internacia lingvo, sed ĝi devas plilarĝigi siajn vortprovizojn, precipe siajn fakajn vortarojn por plej ampleksaj bezonoj de la homaro post la jaro 2000. (Mi preferus diri post nia freneza, nuklee minacanta epoko.) Ni esperantistoj devas esperi, ke la homaro travivos trovinte sanan prudenton kaj bezonos ankau internacian interkomprenilon (artefarita lingvo kaj tial relative nekompareble facila; a posteriora kaj tial kapabla heredi ĉion necesan kaj prudentan el vivaj kaj mortaj, naciaj au artefaritaj lingvoj; fonetika; kun regula akcento; gramatike regula, senescepta; kun nelimigita vortprovizo derivita el relative malnombra radikprovizo; sub la severa direktado de la faka klera lingvosciencia estraro).

Ni ne devas malesperigi pri la sorto de nia planedo, sed batali por la paco sur la ĝusta flanko de la tutmonda barikado kaj laŭplane plue konstrui nian lingvon por la estonteco. Ni havas iajn fortojn, multajn spertojn, nur la tempon ni ne havas tiom, ke ni povu ignori teknikan evoluon de ĉiuj fakoj kaj de la scienco entute.

La plej granda avantaĝo de nia lingvo estas ĝia tiel riproĉata artefariteco, ja precipe fakaj terminoj de ĉiuj eĉ plej mondaĵ lingvoj estas plejparte artefaritaj au transprenitaj.

Nuntempa malfruigo de nia Esperanta faka terminaro en komparo kun grandnacioj, grandega volumeno de la bezona laboro kaj ĝia decidoneco por la tuta movado klare montras, ke tiel grandan taskon povas kontentige plenumi nur nia tuta movado celkonscie gvidata per oferema, entuziasma, klera, bone organizata kaj disciplinita institucio.

Nia movado havas por lingvaj aferoj jam de la jaro 1905 lingvan Akademion.

Nun jam ne sufiĉas nur ia observado au sekvado au postsekvado de la lingva evoluo. Same ne sufiĉas ia akceptado au aprobadado de novaj vortoj, precipe neologismoj, post preciza kaj perfekta konsiderado. Tio estis bona en la epoko de Ido. Nun tio estas tro pasiva kaj tempon konsumanta.

Kiam la homaro sukcesos elimini nuklean apokalipson, verŝajne ĝi ne atentos ĝis kiam ia Esperantista movado aktiviĝos kaj ofertas

tiel necesajn fakajn terminarojn!

Neniu povas pretendi, ke la Akademio de Esperanto mem verku, kompilu vortarojn. Ne, tion certe ne! Sed la plej alta institucio de niaj lingvaj aferoj devas aktive

- difini ĝeneralajn principojn, direktivojn kaj kondiĉojn por fakaj terminaroj entute kaj por unuopaj fakoj speciale;
- organizi laborgrupojn por la preparado kaj poste por la laboro mem en unuopaj sekcioj;
- lasi prilabori programojn por komputiloj por ĉi tiu terminologia laboro;
- lasi prepari laborojn tiel, ke unuopaj partoj de iu fako povu esti proponitaj de unuopaj fakuloj aŭ grupetoj;
- aprobi, proklami kaj sekvi la plenumon de tempaj planoj de terminaro;
- daŭre informi pri sia agado kaj plenumado la tutan movadon per internaciaj kaj naciaj E-gazetoj.

Mi ne volis kritiki, vere ne. Mi estas konscia, ke la laboro por Esperanto estas senpaga kaj multfoje nerekonata. Mi nur sentadis, ke precipe tiuj samideanoj, kiuj vere laboris kaj laboras, kiuj havas hejme milojn da vortslipoj, bezonas gvidadon, apogon, komprenon kaj rekonon.

# nova ŝanco por terminologio

## 1. Faka apliko kaj terminara kaoso

Por ĉiuj esperantistoj, precipe la novaj, gravas la demando: por kio mi lernas la lingvon, kiel mi utiligu mian scion? Ĉu ĝi servas ne nur al kongresa babilado kaj koresponda spertintersango pri vetero kaj personaj vivkondiĉoj - aŭ alivorte: ĉu Esperanto taŭgas por profunde trakti specialajn temojn el mia profesia aŭ satokupa sfero? La respondo konatas: principe jes....!

Principe jes, se ekzistus terminaro pri la koncerna fako, se mi trovus en koncerna vortaro la terminojn, sen kiuj interkomunikado pri iu speciala tereno ne eblas.

Ĉar tiu manko evidentigis jam tre frue en la movada historio, esperantistoj-fakuloj jam antaŭ la 1a mondmilito komencis kompili fakvortarojn. Ili serĉis en la literaturo jam ekzistantajn esprimojn kaj kreis novajn vortojn, kie ili mankis.

Sed okazis, ke kolego el la sama fako, eble eĉ el la sama lando, ne sciante pri tia verko - aŭ ĉar ĝi ne kontentigis lian bezonon - kompilis kaj eldonis alian vortaron. Precipe en la lastaj jaroj tiel estigis multaj duoblaĵoj kaj sinonimoj, malhelpaj por faka komunikado kaj kompromitaj por Esperanto en ekstermovadaj rondo. /Flej konataj ekzemploj: la batalo inter komputilo - komputoro - komputero k.s., resp. dato - datumo - dateno, donitaĵo/

## 2. Unuaj provoj pri kunordigado

Vidante la dangeron, kiu tiamaniere minacas precipe internacian planlingvon, en la 50aj jaroj ISAE kaj la Akademio de Esperanto starigis Terminologian Centron, kiu sub gvido de R.Haferkorn /FRG/ klopodis unuecigi la terminarajn laborojn por Esperanto. En 1970 R.Eichholz /Kanado/ transprenis tiun taskon. Tradukante la germanan "Bilder-Duden" /FRG/ al "Esperanta Bildvortaro" li kunlaborigis cirkaŭ 200 diverslandajn fakulojn. El la slipoj, per kiuj ili intersangis siajn opiniojn, estigis, kvazaŭ krom-produkto, la "Slipara Vortaro".

Nun, en la 80aj jaroj, ekestis nova iniciato por kunordigi la pliigantajn, sed disajn kaj parte paralelajn klopodojn.

En la kadro de la Scienc-Eldona Centro de UEA /SEC/ en Budapeŝt kelkaj volentuloj starigis Terminologian sektion /TeS/, kiu nun, post la - espereble provizora! - likvido de la Budapeŝta oficejo de SEC, rekte ligigas al UEA. La sekretario de TeS, Ivan Bujdoso, Budapeŝto, kolektas adresojn de interesitaj fakuloj por interkonatigi ilin kaj instigi al kunlaboro en internaciaj, fakte specialigitaj terminografiaj komisionoj. Kiel unuaj formigas la komisionoj pri aeronautiko, bibliotekscienco, /bio/-kemio, informadiko /komputiko/, lumigado k.a./.. En junio 1985 eldonigis la unua modesta cirkulero. Laŭ peto la sekretario sendas la unuajn bazajn normproponojn pri la procedo kaj principoj de terminarfarado kaj laŭformaj aspektoj de estontaj norm-terminaroj.

Por plenumo de pli ampleksa laborprogramo necesas mono, kompetenta kunlaboro de specialistoj kaj la aŭtoritato de renomaj esperantaj institucioj.

## 3. Ekstermovada, internacia normiga movado

Kvankam esence grava por Esperanto, la problemo de internacia komunikado tamen ne nur koncernas nian Movadon.

En ISO /International Organization for Standardization/, kiu de la 20aj jaroj okupiĝas pri objekt-normigo, oni sufiĉe frue eksciis, ke normigo de materialoj, substancoj kaj masinoj ne eblas sen interkomprenigo pri la koncernaj nomoj. Tiel eldonigis, apud normoj pri grandoj, mezuroj kaj teknikaj detaloj de industriaj produktoj, ankaŭ normoj pri terminoj de diversaj fakoj.

Por ke tiuj terminaroj estigu laŭ unuecaj principoj, en 1936 eĉ fondigis speciala teknika komitato "TC 37" por ellabori gvidliniojn kaj terminologiajn principojn.

Krom ISO, en kiu nun 74 naciaj norm-komitatoj kunlabore prizorgas preskaŭ ĉiujn /teknikajn/ terenojn, specialaj organizaĵoj okupiĝas pri normigo en specialaj fakoj /IEC = International Electrotechnical Commission, IUFAC = International Union of Pure and Applied Chemistry kaj aliaj/.

En ŝtatoj, kie regas du- au plurlingveco, la konscio pri fakaj tradukproblemoj "launature" estas pli evoluinta: en USSR kaj Kanado Akademio de Sciencoj respektive universitato okupiĝas pri terminologi-normigaj demandoj.

Grandaj industriaj entreprenoj, kiel Siemens kaj Philips, evoluigas proprajn terminologiajn datum-bankojn.

Informojn kaj dokumentojn pri ĉiuj terminologiaj aktivecoj kolektas Infoterm /International Information Centre for Terminology/, la internacia informcentro por terminologio, ki-



un Unesko kaj la Aŭstria Norm-Instituto /ON/ en Vieno fondis 1971. Ĝia ĉefa tasko, apud dokumentado kaj informado, estas kunordigado de ĉiuj priterminologiaj klopodoj sur nia globo.

#### 4. La pioniroj estis esperantistoj-esperantologoj

Cu estas hazardo, ke gvidan rolon en la evoluo de tiu ĉi internacia terminologi-normiga "movado" ludis homoj, kiuj ne nur brile regis Esperanton, sed ankaŭ profunde estis studintaj ĝian strukturon kaj porterminologian taŭgecon? La plej elstaraj estis Eugen WUSTER kaj Ernest DREZEN.

WUSTER lernis Esperanton, tradukis plurajn beletrajn verkojn kaj kompilis 8-voluman Esperanto-germanan "Enciklopedian Vortaron" antaŭ ol li verkis doktorigan disertacion pri "Lingvo-normigo en la tekniko". Tiu germanlingva libro, aperinta 1931, farigis la bazo por la plue evoluo de nova scienco, la "Ĝenerala Terminologio-Teorio" /Allgemeine Terminologie-Lehre: General Theory of Terminology - GIT/. Tiu libro jam entenas la bazajn ideojn por la postaj priterminologiaj rekomendoj de ISO /TC 37/, dum kies ellaborado en internaciaj kolektivoj Wdster estis la gvida kapo. Li ankaŭ instigis kaj energie ekcelis la establon de Infoterm, kies honorofica direktoro li estis ĝis sia morto en 1977.

Sed ankaŭ Ernest Karloviĉ DREZEN, Ĝenerala Sekretario de Sovetrespublikara Esperantista Unio /SEU/, fondinto de la sovetia interlingvistiko kaj aŭtoro de multaj artikoloj kaj monografioj pri la teorio de internacia lingva komunikado kaj la historio de plan-lingvoj, estis samtempe rekonata specialisto pri terminologiaj demandoj. Lau komisio de la Sovetia Akademio de Sciencoj li kontradukis en la rusan la ĉefverkon de WUSTER kaj skribis raporton, sur kies bazo 1936 ISO fondis sian priterminologian teknikan komitaton TC 37. De li ankaŭ originas la ideo pri internacia terminologia kodo. Tiun ideon WUSTER dum plurjardeka okupigo evoluis al tre ampleksa materialo, kiu nun, en la okdekaj jaroj, denove estas en aktuala diskuto.

#### 5. Ŝanco por nova kvalito

La supre skizitaj faktoj en la Esperanto-movado reŝtis vaste nekonataj. Esperanto ĝis nun evoluis precipe dank al la beletro kaj ne utiligis siajn skemismajn avantaĝojn por modelle sistemigita fakleksiko; esperantistoj ne povis utiligi la ŝancon, envicigi en la internaciajn strebojn ĉi-rilate helpe de tiaj "pontaĵ" eminentuloj kiel WUSTER, DREZEN k.a. - la ekonomiaj kondicoj kaj la konscio pri la graveco de scienca-faka komunikado ne estis sufiĉe evoluintaj.

Sed lastatempe ie kaj tie kreskas la kompreno, ke tiel ni ne povos daŭrigi sen riski la ŝancon iam ludi seriozan rolon en ekstermovadaj sciencaj rondoj.

Necesas esenca reorganizado de la faka laboro, necesas verkado/tradukado /kaj eldonado!/ de altkvalitaj enkondukaĵoj en bazajn sciencojn - kaj necesas serioza okupigo pri la subevoluinte faka leksiko sur la nivelo de aktuala internacia terminologio /-scienco/. Unua paŝo en la gustan direkton estas rezolucio, kiun akceptis la komitato de UEA dum la 70a UK en Aŭsburg.

Jen la teksto:  
"I Konsiderante

- ke la scienc-teknika revolucio stimulas impete la evoluon de la faka lingvo,
- ke por la estonta pozicio de Esperanto en la mondo de fundamenta graveco estas ĝia altkvalita apliko en scienco kaj tekniko,
- ke tiu faklingva apliko de Esperanto en la postulenda kvalito eblas nur, se la terminologio respondas al la necesa nivelo kaj ke diletanteo kaj hazardeco de la terminologia laboro grave endangerigas tiun kvaliton

II Proponas al la komitato. ke oni en la jaro 1987 fondu esperanten termin-normigan instituton kun la ĉefaj celoj

- a/ plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron
- b/ reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj /ISO, Infoterm k.s./

III Proponas al la Komitato, ke ĝi komisiu la Terminologian Seccion de UEA /ĝis nun ligiten al la Scienc-Eldona Centro de UEA en Budapeŝto/ kunlabore kun kompetentaj esperantistaj institucioj /Akademio de Esperanto, ISAE, CED, fakaj asocioj k.s./ trovi la kompetentajn homojn, prepari la necesajn dokumentojn kaj entrepreni aliajn necesajn pasojn por ebligi la fondon de tiu Esperanta termin-normige instituto

IV Proponas establi la "Fondaĵon Wŭster" /fondaĵo terminologio/ por certigi la necesajn financajn rimedojn por terminologiaj aktivecoj"

## 6. Ĉiuj povas kontribui

Surbaze de tiu rezolucio eblas la konstruado de pli solida, pli efika institucio ol povis ĝis nun rezulti el la klopodoj de bonvolaj unuopuloj. Sed la sukceso dependos de la preteco de ĉiuj kapablaj esperantistoj, doni sian specifan kontribuon por afero, kiu koncentras nin ĉiujn. Jen kelkaj ekzemploj, kiel eblas subteni la terminologi-normigan laboron:

### 6.1. organize-informe:

internacia /mondvesta/ kunlaboro bezonas homojn, kiuj kapablas fin amplekse organizi. Ili devas akiradi kaj pludonadi ĝisdatajn sciojn pri terminologiaj teorio kaj praktiko /lernado kaj instruado/, per kontaktoj inter movadaj kaj ekstermovadaj instancoj, instigi esperantistojn-fakulojn al terminografia laboro kaj helpi/konsili al ili en organizaĵaj demandoj;

### 6.2. terminografie:

la plej granda grupo da kunlaborantoj estos la fakuloj, kiuj konkrete prilaboros la terminarojn de siaj fakoj. Ili bezonas kaj superrigardan, kaj profundan scion pri sia fako, ĝeneralan kleron kaj bonan konon de lingvoj /ne nur la gepatra kaj Esperanto, sed laŭeble ankaŭ aliaj/; cetere tiu ĉi tasko postulas precizecon, paciencon kaj kun-laboremom;

### 6.3. finance:

la terminologia agado estas science fundamenta kaj la eldonado de /norm-fakvortaroj - pro la relative malgranda uzantaro - ne povas esti enspeza, finance memstara entreprenon, la esperantistaro devos zorgi pri la necesaj rimedoj. Kvankam la laboro de terminografoj /vd. 6.2./ kaj de organizantoj /6.1./ ne estos pagata, tamen ne eviteblas

diversaj elspezoj. «ondonacoj de ĉiuj altecoj do estos bonvenaj;

6.4. eplike:

ne laste necesas, ke la estontaj normoj estos konataj, disvastigataj kaj aplikataj. Neniu ŝtato aŭ jura potenco povas devigi la homojn, ke ili uzu tiun ĉi esperantan terminon kaj ne alian. Pro tio gravas tut-movade komprenemo, por ke fakuloj, /speciale aŭtoroj kaj redaktistoj/ utiligu la terminarojn kaj apliku normigitejn terminojn.

Jen nur kelkaj el la eblecoj por partopreni en la komuna plenumado de grava tasko. Se inter la menciitaj punktoj estas io por vi aŭ se vi havas aliajn ideojn por perfektigi la supran skizon - skribu al: Ivan Bujdos, sekretario de TeS, TeS de UEA  
H-1368 Budapeŝt, Pf. 193  
aŭ al mi: Wera Dehler, /estrarano de TeS/  
GDR -1141 Berlin, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05

IS: Por faciligi nian laboron, bv. laŭeble aldoni kopion de via letero!

---

El la raporto pri la agado de la Scienca-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la jaro 1986 ni elprenas:

- Aktiveco de la fakaj grupoj /FG/:

- a/ Geodezia FG /gvidanto Václav Stibůrek, Benešov/ fintradukis la 1-an volumon de la hungara seslingva geodezia vortaro, kies faka reviziado kunlaboro kun Geodezia, topografia kaj kartografia esplorinstituto en Praha-Zdiby okazis januare 1987. Intertempe oni komencis traduki la 2-an parton de la vortaro. Klopodoj havigi la ceterajn vortar-volumojn estis ĝis nun senrezultaj. Ĉu iu povus helpi?
- b/ Akustika FG /gvidanto Miroslav Baroš, Valašské Meziříčí/ daŭrigis sian laboron super akustika terminaro. Pliaj kunlaborantoj estas urĝe bezonataj.
- c/ Komputista FG /gvidanto ing. Josef Vojáček, Vyškov/ - la agado estis tre modesta. La planata kaj preparata 2-a kongreso de TAKIS en Žilina en 1987 pro diversaj organizaĵ malfacilaĵoj ne povos realigi.
- d/ Agrokultura FG /gvidanto Josef Škoda, Příšovice, sekretario Jan Holec, Třebešice/ krom viglaj kontaktoj kun eksterlandaj agrokulturistoj, precipe kun hungaraj kooperativanoj, daŭrigas la prilaboradon de la botanikaj vortaroj post la morto de s-ano Fr. Mlynář, iama gvidanto de la botanika FG.
- e/ FG aviado /gvidanto Ing. Jan Pospíšil, sekretario Karel Franc, Pardubice/ laboras daŭre super la aviada terminaro.

- Internacia scienca-teĥnika kunlaboro:

- a/ Asocio por enkonduko de nova biologia nomenklaturado disponigis 5 listojn de taksonoj /regnoj de organismoj, filumoj de animaloj, klasoj de ĥorduloj, ordoj de mamuloj kaj familioj de primatoj/ por aprobo fare de trimembra komisionoj. En la komisionoj por aprobo de la antaŭlasta kaj lasta listoj laboris s-ano Lubomír Středa.
- b/ Daŭraj kontaktoj kun la scienc-teĥnikaj formaĵoj en la najbaraj landoj, en Kubo kaj en la Ĉina Akademio de Sciencoj en Pekino.
- c/ Kunlaboro en preparo de la Terminologia Centro de UEA.

(Laŭ Doc. RNDr. Vl. Novobilský, CSc.  
kaj Jiří Laube)

# Ni recenzas

Rikardo Sulco: PLEDO POR UNUECA LINGVO. Eldonis Esperanto-Centro, Paderborno, GFR, 1985. Bindita, 287 p., 21 x 14 cm.

---

Sur la p. 240 de tiu ĉi libro citas la aŭtoro eldiron de G.J. Degenkamp en la j. 1939 kaj prezentas ĝin tiel, kiel L.Mimó aktualigis ĝin: "Dum preskaŭ 100 jaroj ni propagandis Esperanton kiel lingvon malpli malfacilan ol la naciaj lingvoj, tamen la pli multaj Esperantaj verkoj kaj gazetoj enhavas multe pli da eraroj ol generale verkoj kaj gazetoj nacilingvaj."

Sed la afero estas nun ankoraŭ pli malbona ol ĝi estis en 1939. Eŝtis eldonita libro sub titolo "Pledo por unueca lingvo", kaj en ĝi la aŭtoro sur multaj dekoj da paĝoj insistas pri malgusta koncepto de la "problemo ATA/ITA" kaj per tio li kaosis la mensojn de tiuj esperantistoj, kiuj sen speciala lingvistika klareco eklernis Esperanton laŭ eventualaj bonaj lernolibroj kaj nun tiu ĉi verko starigas ilin antaŭ la dilemon: Al kiu kredi?

R.Sulco bazas sian teorion pri ATA/ITA "sur logiko". Mi kalkulis, ke li citas sur 8 lokoj la eldiron de Zamenhof el la Lingvaj respondoj: "... en lingvo arte farita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis." Memkomprene, ke sub la nocio "logiko" li komprenas nur sian pensmanieron. Tial oni legas sur la p. 79 specialan kvarvortan alineon: "1.5. Logiko estas nur unu." Sur la p. 63-69 la aŭtoro argumentas, ke "unu" estas nur numeralo, tial jam Beaufort korektis Zamenhofon: Unu vidvino havis du filinojn, kaj li strekis la vorton "unu". Laŭ la principo de Sulco pri la numeralo oni povus skribi: "Logiko estas nur 1." El tio do rezultas, ke "logiko ne estas 2" aŭ iu alia numeralo. Logiko postulas ekzaktan pensadon kaj tiu evidente mankas ĉe Sulco, ĉar ekzakte li devus diri: "Ekzistas nur unu logiko." Nun li povus skribi sengene: 1 logiko. Sed alia afero, kiun Sulco ne scias, estas tiu, ke kio ŝajnas al iu homo logika, povas ŝajni al iu alia tute nelogika kaj negusta.

Jen ekzemple pri lia logika pensado - citaĵo el Pledo sur la p. 25 - mi prenas 15 liajn liniojn: " , La paketo estos ekspedita morgaŭ. Tiu frazo estas tute neebla Esperanto. Ĝi estas tiom negusta, kiom ekzemple estas negusta la frazo "mi vidas domo" aŭ "en la strato troviĝas nur unu domoj". Laŭ la akompananta traduko en la lernolibro, la ekspedado okazos morgaŭ. Tio esprimiĝas en Esperanta pasivo: La paketo estos ekspedita morgaŭ. Oni tamen povas, kaj tute guste, ankaŭ diri: Morgaŭ la paketo estos ekspedita. Sed tio signifas, ke la ekspedado okazos hodiaŭ. La komprenema leganto bonvole atentu la pozicion de la tempa adverbo! Post la partecipo ĝi esprimas la tempon de la ago, antaŭ la partecipo ĝi sig-



nas la priperolatan tempon. Fri tio jem atentigis Ludoviko Mimoo en 1973 /REGULA ESPERANTO, p. 109/. Nur pro tio oni ja delonge devus elekti lin membro de la Akademio...."

Tio do estas la "logika" pensado de R.Ŝulco. Li ne konsciigas, ke se la paketo estos ekspedita morgaŭ je la 10,00 horo, ĝi estos ekspedita morgaŭ jam je la horo 10,00,01 /deka kaj unu sekundo/. Kaj pro tio, ke iu proponas enkondukon de rigida vortordo en Esperanto - la pozicion de "morgaŭ" - oni devus nomi lin Akademiano! La pozicio de la vorto "morgaŭ" en la frazo estas tute apuda afero kaj dependas de tio, kiun frazeron la diranto deziras emfazi. Lia logiko certe ne devas esti tia kia ĉe R.Ŝulco.

Ĉeĥe oni diras: Balík bude odeslán zítra - La paketo estos ekspedita morgaŭ. Balík bude odeslán zítra - La paketo estos ekspedita morgaŭ. Zítra balík bude odeslán - Morgaŭ la paketo estos ekspedita. Odeslán - ekspedita - ĝi estos jam for. Odeslán - ekspedita - oni laboras pri ekspeditado. Tio povas okazi kiam ajn dum la tuta morgaŭo, kaj nur kiam tio estos plenumita, la paketo estos ekspedita, ĝi estos for, ankaŭ dum la morgaŭo. Tiel esprimas la aferon "la mizera aspektismo", dum "la logika tempismo" konstruas sur pozicio de unu vorto en la frazo.

Simila estas la afero pri la ATA/ITA "problemo" sur la p. 43: "Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; unu tagon, promenante apud la reloĵ de forvojo, li falis sur la radojn de veturanta vagonaro kaj mortigis." Apelaciante al la Zamenhofa eldiro pri logiko, R.Ŝulco diras: .... mi preferas diri "estis mortigata" anstataŭ "estis mortigita". Post tiu ŝanĝo la frazo konformas al la Zamenhofa sistemo /temposistemo/ laŭ la sesa regulo. Estus bone, se tiu erara uzo de "estis -ita" arkaikigus.

R.Ŝulco bonvolu scii: en la ĉeĥa lingvo la ekvivalento por "estis mortigita" = "byl zabít" kaj la ĉeĥa traduko de la tute frazo povas enhavi nur tiun ĉi formon, ĉar ĝi esprimas, ke la faro de la mortigo estis plenumita. Se oni diras "estis mortigata", ĉeĥe "byl zabíjen", tio signifus, ke la fino de la ago ne estas esprimita, ke la ago de mortigado daŭris kaj oni ne scias, ĉu ĝi finigis.

El tio rezultas ankoraŭ alie afero: Se oni akceptus la principon de R.Ŝulco pri "estiĝ -ata", oni devus instrui al ĉeĥaj lernantoj jene strange: En la ĉeĥa frazo "byl zabít" estas uzita preterita pasivo, sed en Esperanto oni devas uzi pasivon prezencan "estis mortigata", ĉar... kaj sekvas longa klarigado pri la "atismo", pri kiu klopodas konvinki esperantistaron R.Ŝulco. Kaj tia instruado pri escepto certe ne utilis al ĉeĥaj Esperanto-lernantoj.

Nur mi ankoraŭ volas menci, ke R.Ŝulco ne okupigas pri la vortoj "unu tagon", kiujn oni legas en la frazo pri la onklo. Jam mi parolis pri "unu vidvino". Ankaŭ ĉeĥe oni diras sammaniere "jedna vdova", kvankam nia lingvo havas nek difinan nek nedifinan artikolon, kaj tio pri "unu", pri kiu Ŝulco amplekse referas sur la p. 63-69 sub la titolo: "Esperantista komedio. Ne pri unu gramatikero, nek pri iu gramatikero, sed pri gramatikero," havas sendube ankaŭ radikojn en la slavaj lingvoj, kvankam sur la menciitaj paĝoj Ŝulco atakas G.Waringhienon kaj lian "kaj la ceter" - nur literaturo". En la ĉeĥa lingvo estas ofte uzata la vorto "unu" - "jeden, jedna,

jedno" - laŭ la gramatika genro - kaj ekzistas ankaŭ pluralo "jedni" - unuj; la ŝenco estas "iu, iuj". Ankaŭ en la frazo pri la onklo oni diras ĉefe "jednoho dne" - unu tagon. Jam mi aŭdas Ŝulcon protesti, ke "Esperanto estas autonoma lingvo" kaj ke oni devas "liberigi de naĉiamaniera pensmaniero" - sed Esperanto estigis kaj restas lingvo europdevena kaj kiel tian oni akceptu kaj uzadu ĝin.

En la titolaj linioj de tiu ĉi artikolo vi tralegis tri esperantigitajn nomojn. Jes, esperantigi ĉiujn proprajn nomojn, tio estas unu el la aferoj, por kiuj R.Ŝulco pledas. Sur la p. 124 li diras: "Por la Esperantigo jam pledis Zamenhofo mem." Bone mi re-skribis: majuskla E en Esperantigo kaj Zamenhofo kun aldonita -o. Tio suspektigas, ke la pledanto volas esti pli papa ol la papo mem. Liaj principoj pri la esperantigado estas strangaj. Kalocsay estas laŭ li Kolomano Kolocŝajo /dufoje Kolo-, eble tial, ke "a" en la hungara lingvo havas ĉe prononcado iom da nuanco al "o"/. Pluaj ekzemploj: Gastono Varengjeno, Goethe estas Gojto, Lenin - Leneno, Stalin - Staleno, pri Kanto li evidente forgesis, kvankam li multfoje mencias legadon de biblio, Hebel - Hebelo, sed Hebbel - Hebelo. Virinojn li nomas ekz. Evino, Olgino, Veronikino, la konata Marta de Zamenhof farigas Martino, Lidia devas esti Lidino ktp. Sur la p. 145-155 li vidigas liston de ĉirkaŭ 340 tiel adaptitaj virinaj nomoj, inter ili ankaŭ Lino kaj Nino. Ĉu ili estas vere L-kaj N- plus sufikso? Sur la p. 137-139 oni povas legi preskaŭ 50 nomojn de germanaj personoj, inter ili neniu virino. Kial? Kaj pri geografiaj nomoj: Kial ekz. Zug farigas Cugo, sed Zŭrich - Zuriko, kvankam en ambaŭ germanaj nomoj estas prononcata C-. Cetere lia teorio pri esperantigado de nomoj sur la p. 124-137 estas mirige komplika. Ĝe unufoje li ne mencias la Poŝatlason de la mondo /Prago 1971/, evidente li ne konas ĝin.

Akre li atakas Kalocsayon /p. 139/, ke li kaosigas la lingvon, enkondukinte la -a formojn ĉe la virinaj nomoj. Ŝulco ne pensas pri tio, ke laŭ lia aŭstera teorio pri la -ino sufikso jam la Fundamento mem enhavas "virinajn" formojn ĉe ordinaraĵ vortoj kiel fino, lino, mino, vino, simile estas ĉe multaj kemiaĵoj k.s.: anilino, kokeino, penicilino, vitamino ktp. ktp. Ne eblas do absoluta "pureco" de ĉiuj elementoj en la lingvo.

Koncerne la skribadon de majuskloj: Fakto estas tia, ke Esperanto estas pli legata ol parolata lingvo. Sed ĉu oni distingas majusklojn de minuskloj en parolo ĉe la propraj nomoj? Kiam oni finas frazon parolante, oni ŝansas intonacion ĉe la lasta vorto de la frazo, sed prononcante la unuan vorton de la plua frazo, ĉu oni diferencigas inter majusklo kaj minusklo? Kaj kiam mi diras ekzemple "La uzbeko estas alta", ĉu homo, kiu neniom scias pri la uzbeka nacio, ekkonos, ke temas pri nacio? Nur kontaksto povas helpi al li la gustan komprenon, sed alimaniere li povus pensi ekzemple, ke temas pri monto aŭ iu al li nekongata arbo. Mi ne konsentas pri troa uzado de majuskloj, nek laŭ Ŝulco, nek laŭ FIV, en kiu nomoj de nacioj kaj monatoj estas skribitaj kun majusklo, ĉar se oni skribas "la Ĉeĥo", estigas escepta uzo de "la" antaŭ propra nomo.

La nomon de sia instruisto kaj "Polusa stelo", kiu lin gvidis ĉe lia logika unuecigo de Esperanto /p. 15/, Luis Mimó Espinalt; li adaptas je Ludoviko Mimoo Espinalto. Nenie mi trovis klarigon, kiel prononci la du -oo en Mimoo. Plurloke /ekz. sur la p. 127/ li

tan agadon fare de kontraŭulo laŭ ties ideomotoraj movoj, li antaŭvidas ion, kio ĝis nun kiel fenomeno ne ekzistas kaj kio plej verŝajne estiĝos (kun certa probablo), sed kio ne necese devas ekesti. Li elektas do ĝenerale ĉiam unu el kelke da alternativoj de sia kondutado laŭ rezulto de sia identigado pri la plej verŝajna agado fare de kontraŭulo. El tio devenas la nomo de tiu ĉi reagado - multsignala - kaj ni egale nomas ankaŭ la batalesistemojn aŭ batalkompleksojn, kiuj estas bazitaj sur la multsignala reagado (identigado). La klasikaj batalkompleksoj estis, kiel evidentas el ties enhavo, plejparte multsignalaj. Tio signifas, ke la agadoj, kiuj ilin konsistigas, perdas sen multsignala reagado sian sencon. Tamen ellerni reagi multsignale daŭras multe da jaroj kaj bezonas, kromalie, grandan talenton. Plue, por reagi multsignale oni devas esti en oportuna psiĥa stato. Ne mirigas do, ke japanaj kaj ĉinaj skoloj de batalarto dediĉis grandan zorgon ne sole al la fizika, sed ankaŭ al la intuicie konceptita mensa sinpreparo de la lernantoj. Kiam batalanto timas, li ne povas reagi plene multsignale, aŭ eventuale tute perdas tiun ĉi sian kapablon. La batalanto sekve de tio ne povas anticipi specon, direkton kaj ritmon de kontraŭul-agoj. Al li restas kondukti sole tiamaniere, ke li nur poste, aŭstere, klopodas forigi la konsekvencojn de estintaj aferoj. Tiun ĉi tipon de reagado ni nomas kvaŭzsignala.

La homo, reaganta kvaŭzsignale (+), facile suferus malvenkon batalante kontraŭ rapidan kontraŭulon, se tiu kiel la unua komencus sian atakon. La multsignala (++) reagado en la sindefendo-situacioj estas subkonscia. Konscie anticipi la specon de batalagoj faritaj de la kontraŭulo estus tre malrapide, do por la solvado de la sindefendo-situacioj neutiligebla.

Interesaj estas okazoj de iuj profesiaj boksistoj, goluloj k.t.p., kiuj boksas aŭ kaptadis laŭŝajne mirakle. Estas necese supozi, ke tiuj ĉi personoj reagis en sportaj situacioj certgrade multsignale. Sed oni scias ankaŭ, ke kelkaj el tiuj ĉi homoj ne kapablis montri sian arton interbatalante kun nekutimaj tipoj de kontraŭuloj, aŭ pro kaŭzoj ne tute klaraj (ekzemple post malsano, longa senagado, diversaj psiĥaj konfliktoj k.t.p.) kaj ili preskaŭ subite falis sur la mezan aŭ submezan nivelon. Tio certe ne surprizas, se oni scias la teorion de la multsignala reagado. Tiuj ĉi homoj atingis per sporta trejnadado - intuicie - sian nivelon de laŭokaza multsignala kondutado en la sportaj situacioj; sed sen speciala mensa sinpreparo ilia multsignala reagado okazas necese hazarde. Trakti tiujn ĉi problemojn pli detale ja estus jam eksterkadre de tiu ĉi libro kaj ekster la intencoj, kiujn ni ĉi tie sekvas.

(El la p.13) Pli alta speco de la sindefendo estas la t.n. monosignala sindefendo. Ĝi uzas la t.n. monosignalan identigon. Ĉi tie, kontraste al la kvazausignala aŭ la multsignala identigoj, la batalanto ne identigas ion, kio jam kiel fenomeno estiĝis, aŭ plej probable estiĝos, sed ion, kio okazi ne povas. Konkrete: solvante sindefendo-situacion ni produktas ĝin tiamaniere, ke ni ne povu esti trafitaj dum nia atako. Poste ni atakas.

(El la p.13) Ekzistas diversaj specoj de la multsignala reagado (identigo) laŭ tio, kion la reaganto anticipas. Se li anticipas konkretan fenomenon formon de io, ni parolas pri la fenomena multsignala identigo (reagado). Tio estas ja malplej avantaĝa speco de la multsignala reagado, ĉar la klaso de estontaj okazintaĵoj en ties fenomenforma formo estas tre larĝa. Se li antaŭvidas la klasojn de la kontraŭul-agoj, tio estas la t.n. klasmultsignala identigo (reagado). Ĝi estas duspeca: la malfermita kaj la fermita. En la unua okazo la defendanto ne scias, ĉu povas ekzisti ankaŭ aliaj klasoj de batalagoj, aŭ li scias, ke tio eblas. Memkomprene, se aperus iu atakago el tiuj nekonataj klasoj de la batalagoj, kiun li vanigu per iu defendago, li kondukus kvazausignale. En la dua okazo li konas ĉiujn klasojn de la agoj, kiuj ekzistas; de tie ankaŭ la nomo fermita klasmultsignala identigo (reagado). Surbaze de la fermita multsignala reagado estas konstruita ĉeĥa speco de la karateo, nomata branao. En tiu ĉi libro ni klopodas, ke la batalanto povu laŭeble plej vaste profiti de rezultoj el la fermita klasmultsignala identigo (reagado). Por laikoĵ oni pli multe fari ne povas.

#### 1.10. Klasikaj batalkompleksoj kaj reduktita kurso

Tutmonde estas sufiĉe popularaj kaj konataj la ĵudo, ĵuĵucuo, aikido kaj la karateo. El la karaktero de la plimulto el la batalagoj ilin konsistigantaj rezultas, ke ili supozas multsignalan reagadon. La batalagoj el tiuj ĉi batalartoj sen multsignala reagado estas en la praktiko plenumoblaj aŭ tute ne, aŭ (iuj evertoj kaj rompumoj) sole per uzo de tre granda forto. Tio donas al atakato ŝancon kontraŭfrani. Tial ankaŭ defendagoj rekomenditaj kontraŭ rapideajn atakojn (ekz. frapojn) en ĉiuj lernolibroj pri la sindefendo, se ili bezonas multsignalan identigon, estas por la reduktita kurso neaplikleblaj. En la reduktita kurso oni nome ne povas ellerni reagi multsignale kaj kvazausignale reagado fare de la defendanto ne sukcesus vanigi rapidan kontraŭul-atakon. Krome, atendado de kontraŭul-agado, havanta lokon ĉe multsignala solvo de la batalsituacio (kie ĝi necesas), estas malutila en la batalo komprenata kvazausignale. Ĉi tie estas rapida atako la unusola espero de la defendanto; la atendado de kontraŭul-agado necese kondukas al malsukceso ĉiam, kiam temas pri rapidaj atakoj.

Tamen por majstre komprenata ekzercigado tiuj ĉi lernolibroj ankaŭ estas senvaloraj, ĉar mankas en ili informoj ne sole pri la mensa sinpreparo (kion oni ne povas riproĉi al la aŭtoroj), sed ankaŭ pri la taktiko kaj metodoj, por anticipi la batalagojn fare de kontraŭulo.



En la reduktita kurso do ne havas sencon kontraŭ frapojn lerni tiajn defendagojn, kiel kanodevigojn (dorsen, flanken,...), paratojn kaj parte translokadojn. Por kontraŭtaksi kontraŭulon post venigo de lia atako ne havas sencon lerni komplikajn batalagojn kiel ekzemple evertojn, rompumojn aŭ strangolumojn. Tiuj ĉi batalagoj supozas ankaŭ multsignalan reagadon (la defendanto devas kapabli anticipi direkton, rapidon kaj ritmon de movigo de mascentro ĉe kontraŭulo kaj multe da aliaj aferoj). Tion oni povas ellerni sole post multjara klopodo.

Kion oni do lernu? Kion apliki por venki kontraŭulon? Ni jam diris, ke la celo de la reduktita kurso estas certigi al leiko, se tio eblas, maksimuman ŝancon sukcesi ĉe solvado de la sindefendo-situacioj en la batalo kontraŭ leikon (kvazausignalan kontraŭulon). Al ĉi celo ordinare sufiĉas scipovi kelkajn atakegojn kaj defendagojn, kaj adekvatajn taktikajn principojn, kiuj ebligas efektiviĝi la batalagojn kun akceptebla ŝanco sukcesi. Granda avantaĝo de limigita nombro da lernataj batalagoj estas, ke la tempo, necesa por ilia ekrego, mallongiĝas (ellerno de la batalago kaj ĝia kunigo kun la signalo). Sed tio ne estas ĉio. En batalo la defendanto devas elekti oportunan defendagon aŭ atakegon. Ju malpli da eblecoj, des pli rapida estas la elekto. Ellerni multe da batalagoj ne alportas sole avantaĝojn, kiel oni ofte opinias. Memkomprene estas necese scipovi ĉiujn bazajn batalagojn por solvi la plej grandan nombron el situacioj, kiuj povas aperi. Tio estas antaŭ ĉio tasko de la taktiko.

Por ke ni laŭeble plej bone klarigu la trastuditajn temojn kaj por ke la apliko de la atingitaj rezultoj estu unusignifa, ni resumos en la plua teksto la rezultojn en kelke da taktikaj instrukcioj (pri la produktado kaj solvado de la sindefendo-situacioj), taktikaj direktivoj (pri la komenco de la interbatalo), taktikaj principoj (pri la signifo de distanco inter batalantoj dum solvo de la sindefendo-situacioj) kaj metodoj de sinsekurigo (pri eblecoj, kiel sekurigi sin kontraŭ la t.n. koincidan atakon).

Por bezonoj de la reduktita kurso oni ne povas fari vastan motivadon de la taktikaj instrukcioj, direktivoj, principoj, metodoj de la sinsekurigo kaj de la batalagoj. Al tiuj, kiuj havas pli profunden intereson pri dedukto, eventuale konstruado de la taktikaj principoj por la sindefendo, ni rekomendas iujn pli specialajn verkojn, kiuj estas listigitaj ekz. en (24).

La ĝisnunan klarigon ni nun resumus en jenaj instrukcioj:

Instrukcio n-ro 1: Ni ĉiam klopodu agi tiamaniere, ke estu konservata nia ebleco elekti inter la sindefendo- kaj la sinprotekto-situacioj; se ni sukcesis, ni evitu la sindefendo-situacion.

Instrukcio n-ro 2: Se ni ne povas eviti la sindefendo-situacion, ni solvu ĝin senprokraste kaj sen konsidero pri malutilo, kiun ni eventuale kaŭzos al kontraŭulo.

## Dua parto - batalagoj


### 2.1. Batalagoj

Por solvado de la sindefendo-situacioj interesas nin antaŭ ĉio batalagoj, kiuj estas tre efikaj kaj aplikeblaj de normal-statura homo post necesa sinpreparo. Antaŭ ol ni aliros al la lernado de la batalagoj, estas necese trapraktiki bonan fizikan sinpreparon. En diversaj lernolibroj pri la sindefendo oni asertas, ke studado de la sindefendo ne bezonas grandan forton kaj ke la sindefendon povas ellerni eĉ virinoj kaj gekneboj. Sed tio ne estas vera. Por efektiviĝi pezan frapon necesas granda dinamika forto. Aliflanke estas ankaŭ vere, ke ĉiu normal-statura kaj bone ekzercita viro kapablas ellerni la frapojn tiomgrade, ke li povas per ili sendangerigi ajne fortan homon. Povas do viro, kiu ne estas sufiĉe forta por levi super sian kapon 60 kg, venki la kontraŭulon, kiu sen malfacilaĵoj SKVATAS kun 300 kg peza haltero sur sia nuko. Sole ĉi-sence aserteblas, ke forto "ne gravas". Pli ĝuste estas diri, ke pligrandigi sian statikan forton super certan limon ne havas, por la celoj de sindefendo, signifon. Se ni defendu nin uzante luktumojn, la situacio estas pli komplika, ĉar ni riskas dum relative longa tempo-intervalo, ke la kontraŭulo povas levi kaj ĵeti nin surteren aŭ frapi nin. Ĉi tie la diferenco inter la fortoj ĉe batalantoj povas manifestiĝi jam tre fatale kaj ne estas eble kompensi ĝin facile. Tial ni rekomendas lerni por la celoj de la reduktita kurso de sindefendo la frapojn per armiloj aŭ per okazaj armiloj kaj sole duavice per taŭga parto de sia korpo (pugno, manplato, ...). Por realigo de elektitaj batalagoj oni devas memkomprene krei favorajn kondiĉojn. Al ĉi tiu celo servas staroj, translokado, helpiloj kaj okazaj rimedoj. Per elektra poŝlampeto (= helpilo) oni nokte brilblindigu la kontraŭulon, kio ege malplifaciligas al li defendi sin aŭ ataki. Seĝo (= okaza rimedo), kiun batalanto tenas antaŭ si, taŭgas por ŝirmi lin ekz. kontraŭ ĵetitajn objektojn, k.t.p.

### 2.2. Korpa sinpreparo (37 linioj, fig.1-3, t.e. 29 desegnaĵoj)

SKVATO estas la ekzerco laŭ la fig.V-1 (ĉ: dĥep).  
-I' fari SKVATOn (ĉ: provést /udĉelat/ dĥep).

Fig.V-1



akre atakas esperantajn vortojn kun duoblaj konsonantoj. Neniam kaj nenie mi legis, ke pro la fonetikeco de la lingvo oni povas tute oportune prononci fin-no, vat-to, sen-nombra, lit-tuko, mal-longa ks., ĉiam do ambaŭ konsonantojn, kaj la afero estus solvita. Nur unu vorton mi konas, kie tio ne eblas, t.e. Finnlando. Dufoje mi trovas en PIV la formon Finnlando, kiel kapvorton kun noto "Z", kaj sub Helsinki. Sed kial ne ŝangi ĝin je Finnujo /vd. sub Finnlando en PIV - kvankam mi preferas Finnio/ - au, laŭ la nacia lingvo, Suomio /ankau en PIV/. Ni, ĉeĥoj, estis ĝis 1918 /estigo de Ĉeĥoslovakia/, ordinare ĉiam nur "bohemoj" /ekzistis du landaj societoj kun tiu epiteto/, sed post la memstarigo de la ŝtato la vorto "bohemo" malaperis kaj hodiaŭ neniu uzas ĝin en la senco "ĉeĥo".

Sur la p. 196-205 Ŝulco akre kritikas paraĝrafojn 113 kaj 114 de Plena Analiza Gramatiko pri la pasiva voĉo. Ankaŭ mi ne konsentas kun Waringhien, ke "La ŝlosilo estis perdata" havas la sencon, ke oni "ripete perdis /perdadis/" la ŝlosilon. Sed analoge konkludi, ke "Lau ĝi por la frazo "oni malfermis la pordon" responde pasivo ne ekzistas, ke tiu ekzistas nur por la frazo "oni malfermadis la pordon", nome "la pordo estis malfermata", estas troigo. Cetere, mi ne dirus kiel Ŝulco, ke ŝlosilo "estis perdata", sed "estadis perdata". Simile ne "ŝi estis vestadata", sed "ŝi estadis vestata". Kaj "oni vestadadis ŝin" estas ironio.

En siaj citaĵoj el PAG par. 114, p. 154, Ŝulco dufoje eraras kaj sekve faras negustajn konkludojn: sur la p. 202, lin. 3, devas esti "estas" /ne "estis"/ kaj "afliktas" /ne "afliktis"/. Sur la p. 203, lin. 4 /PAG par. 114, p. 155/ li ellasas la vortojn "antaŭ momento", kiuj apartenas inter "kiu... estis", sed en la pluaĵ lini-oj la ellasitaĵoj li citas, tamen skribante "donata" anstataŭ "donita".

Nun ankoraŭ nur kelkaj detaloj. Ŝulco uzas la vorton "maĵorio" /neologismo/ anstataŭ "plimulto" /p. 11 kaj aliloke/. "En lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon, diris Zamenhofo" /p. 18/, kaj Ŝulco aldonas: "kaj lia eldiro signifas ankaŭ, ke oni devas obei la logikon pli ol Zamenhofon." Nu, eble mi pruvis la nivelon de la Ŝulcoa logiko /noto: Ŝulcoa = de Ŝulco, mia propono/. "En Esperanto gramatiko kaj logiko estas identaj" /p. 19/ - ĉu vere por ĉiu esperantisto? "Grandmagazeno" /p. 23/: tiu vortformado estas monstra, diras Ŝulco, ĉar la elizio de "a" estas "kontrau-Fundamenta" krom en la artikolo "la". Dank'al.... /p. 24/: La elizio de la adverba "e" estas ankaŭ "kontrau-Fundamenta" laŭ Ŝulco.

La paĝojn 55-62 dediĉas Ŝulco al Karolo Piĉ kaj lia La litomila tombejo. La libro ne estas konata en nia lando. Laŭ Ŝulco, Piĉ enkondukas 64 neologismojn por prepozicioj, adverboj, sufiksoj, prefiksoj eĉ konjunkcioj. Tial Piĉ estas nomata idioto kaj stultulo.

Sur la paĝoj 238-271 estas prezentitaj leteroj de L. Mimó pri la problemoj de Esperanto. Sur la p. 241 li citas Zamenhofon, ke "... la pioniroj de novaj ideoj renkontas plej ofte mokon." Nu, ankaŭ mi tion spertis. Sur la p. 246 oni legas vortojn kiajn ekz.: elfermi, elatingi, elripari - en la senco "fari ion ĝisfine". Li malaprobas "finlerni", ĉar oni ne diras "komenclerni" /p. 247/. Sur la p. 256 li kulpigis Waringhienon pri nehonesto agado ĉe elektado de Akademianoj: estis elektitaj "busumitaj" personoj kaj inter tiujn L. Mimó ne apartenas. Laŭ Mimó, Fernando de Diego "mistradukis

Don Kiŝoto de la Manĉo" /p. 262/, sed oni scias, ke Diego ricevis de UEA premion pro tiu traduko kaj aliaj prilingvaj meritoj. ".... eliri el tiu ĉi marĉo de netoleremo kaj fanatikeco," tion bezonas Esperanto /p. 263/. Estas ".... principa eraro konsideri la lingvon artan kvazaŭ natura", asertas Mimo sur la p. 266. Kaj oni povas citi ankoraŭ pluajn similajn pensojn.

Pleas al mi la novaĵo "maltre" /p. 13 kaj aliloke/ kaj la uzado "Li estas tiom granda kiom mi" /p. 21 ktp./ Sulco ankaŭ neniam uzas "fare de" aŭ "far", kvankam ĉe la pasivaj participoj li havas sufiĉe multe da okazoj por tio.

Sed jam sufiĉe. Mia artikolo tro plilongigis, se mi plu foliumus en la "Pledo" kaj nur ion nege notus pri preskaŭ ĉiu pago. Tiel povus esti nova libro, eble sub la titolo "Anti-Sulco". Mi nur citas ankoraŭ el la p. 28: ".... granda toleremo saĝnas al mi bezonata kontraŭ la malfortuloj en lingvaj aferoj." Sed eldono de la "Pledo por unueca lingvo" estas laŭ mia opinio afero nepardonebla kiel por la aŭtoro, tiel por la eldonejo.

Adolf Staŭrs  
prez. de la Lingva komisiono  
ĉe ĈEA

FRÝDEK-MÍSTEK. En la konata KAFEJO ESPERANTO oni aranĝas ĉiumonate interesan programon esperantlingvan por esperantistoj kaj poste ĉeflingvan por la neesperantista publiko. Por la fino de la nuna jaro oni preparis jenan programon: la 18-an de oktobro - La semajno en Varsovio - rakontado de partoprenanto de la UK, Vojaĝo al Balearoj - geedzoj Sýkora; la 15-an de novembro - Ĉirkaŭaĵo de Leningrad - M. Pastrňák, Nova socialisma poezio; la 20-an de decembro - El Luksoro en la Valon de reĝoj - J. Pastrňáková, De Asuano al Nubio - J. Pastrňáková. Ĝuu ankaŭ vi la dimanĉajn posttagmezojn en KAFEJO ESPERANTO.

PRAHA. Laŭ la peto de MEM-sekcio de ĈEA kontribuis la praga E-klubo al la ekspozicio de samarkandaj esperantistoj. Jen ilia respondo de la 18-a de marto 1987: "Karaĵ gekamaradoj, bonorde kaj goje ni akceptis vian sendaĵon kun vere interesaj materialoj kaj varme ni dankas pro via afabla reŝo al nia alvoko. La 25-an de februaro kunlabore kun la urba societo por sobro en la centra niaregiona biblioteko ni aranĝis sufiĉe ampleksan ekspozicion submote "En sana korpo - sana spirito". Tie ni eksponas diversspecajn materialojn el 12 landoj, i.a. ankaŭ el frata Ĉeĥoslovakio. Pri la evento raportis radio, gazetaro kaj televido, aperis afiŝoj kaj invitiloj. Ni decidis, ke gi farigu en Samarkando tradicia. Same ni daurigas nian laboron en la antaŭnelonge fondita Muzeo de Paco kaj Solidareco, kiu situas en la centra urba parko. Unuvorte, laboro ne mankas. Ni varme kaj sincere salutas vin kaj viajn familiojn el antika, 2500-jara Samarkando. Fartu bone. Venku la Paco! Restas kun amikeco viaj E-samar-kandanoj."

ZNOJMO. EG Znojmo aranĝis la 9-an de aprilo VESPERON de ESPERANTO okaze de 70-jara jubileo de la morto de D-ro Zamenhof, kun kultura programo: deklamado, kantoj en E, ekspozicio de bildkartoj kaj prelego pri vivo kaj verko de Zamenhof. Parolis s-ano Vlad. Rotrekl. Partoprenis ankaŭ novaj adeptoj de Esperanto, precipe junaj.

Estas fondata "Fakgrupo por terminologio en Esperanto", kiu kunlaboros kun la Terminologia Esperanto-Centro (TEC) en Budapeŝto kaj eldonados Esperantajn Normojn (fakterminarojn, tradukojn de ISO-normoj ktp.). Kunlaboremuloj skribu al Ing. Jan Pospíšil, Lublanská 49, 120 00 Praha 2 - Vinohrady.

# ART- LITERATURA SEKCIO

## BILANCO

Jiří Karen

La kvinjara agado de la literatura sekcio de ĈEA 1981-1986

Celoj kaj taskoj de la sekcio: Maksimuman programon enhavas la statuto de la sekcio, minimume estas formulebla per jenaj punktoj:

1. Instigi literaturan kreadon de la membroj en la ĉeĥa lingvo kaj Esperanto /traduka kaj originala kreado/.
2. Helpi la membrojn de la sekcio plialtigi sian literaturan kvalifikon kaj nivelon - enhaven kaj lingvan - surbaze de prelegoj, kritikaj rimarkoj kaj diskuto pri gravaj temoj, cene kaj precipe en Esperanto.
3. Atentigi la membrojn pri gravaj verkoj, esperante eldonitaj en la poezia kaj proza sferoj, precipe pri verkoj gravsignifaj por la Esperanto-evoluo kaj originalaj verkoj esperantaj, kreitaj speciale de membroj de la Esperantlingva Verkista Asocio.
4. Atentigi la membrojn pri gravaj verkoj ĉeĥaj kaj slovakaj, signifoplenaj por pliperfektigo de la sekciana nivelo. Envicigi la kreadon de la esperantistoj en kuntekston de la literaturo ne nur esperanta, sed ankaŭ nacia.
5. Disvastigi Esperanton pere de kontaktoj kun signifaj lingvosciencistoj, sciencfakuloj kaj aparte verkistoj, kies verkojn ni eventuale ankaŭ tradukos kaj popularigos pere de Esperanto; laŭeble ankaŭ ligi kontaktojn kun signifaj esperantistaj verkistoj de ĉiuj nacioj korespondvoje kaj per okazaj personaj kontaktoj.
6. Certigi publikadon de laborrezultoj de sekcianoj en la revuo Iaco kaj en ĝia literatura suplemento; minimume unufoje dum la jaro eldoni ĉi tiun suplementon pri signifa temo.

Plenumado de la suprenomita programo:

La sekcio sisteme kaj laŭplene:

Arangis kunvenojn de la sekcianoj, minimume sesfoje dum la jaro, iam eĉ pli ofte. La kunvenojn ceestis mezkvante 15-19 membroj. La kunvenoprogramoj en la labora komencjaro de la sekcio 1980 estis dedicita al konatigo kun esperantistoj originale verkintaj /k. Jiří, J. Kořínek, O. Kníchal, E. Urbanová, E. Seemanová, J. Vondroušek/.

En la jaro 1981 ni transiris al aranĝo de renkontigoj kun kelkaj ĉeĥaj verkistoj, bonrilate ligitaj al Esperanto. Ili estis precipe la Merithava Artisto d-ro František Kožík /2x/, Fr. Lazec-ky, J. Rumler, la Merithava Artistino M. Tomanová, C. Vidman, Jiří Karen, Ota Dub.

La nomitaj prezentadoj elvokis vastan enon kaj pliparte ceestis abunda publiko. En 1982 ni, krom la renkontkunvenoj, ekis

konatigon de la membroj kun signifoplenaj verkistoj kaj poetoj esperantlingve verkantaj /W.Auld, M.Boulton, J.Baghy, K.Kalocsay kaj plusaj/, ni aranĝis vesperojn dediĉitajn al la kreado de unuopaj sekcianoj /E.Urbanová, Č.Vidman, J.Rumler, Fr.Lažický/.

En la jaro 1983 ni atentkoncentrigis je diskuto pri libroj: Lingvo kiel ponto kaj abismo /ĉeĥa/, Hungara antologio, je evoluo de la originala esperanta poezio kun muzikigo de poemoj, kanto kaj gitarludo /prezentis P.Jodasová kaj Ing. J.Pečený/ kaj ni pridiskutadis la verkojn preparotajn kaj redaktotajn de unuopaj sekcianoj. En tiu ĉi jaro temis pri la verketo far J.Rumler En la koro de Eŭropo.

En la jaro 1984 ni koncentrigis je problemoj de la moderna poezio, poezio de la ligita kaj libera verso, ni pridiskutis la ceftezojn de preparataj suplementoj de Paco: Kvarfolio /specimeno de originala kreado de la kvar poetoj esperantlingve verkantaj - Urbanová, Rumler, Vidman, Karen/ kaj de la tradukistoj J.Kořínek kaj J. Karen: Poeto ne mortas.

La atento koncentrigis ankaŭ je EVA - Esperantlingva Verkista Asocio.

En la jaro 1985 la ĉentron de nia laboro reprezentis renkontiĝo ĉe ronda tablo kun ĉeĥaj lingvosciencistoj, ni atentkoncentrigis je eldonitaj verkoj de ĉeĥaj esperantistoj K.Fiĉ /Litomišla tombejo/, E.Urbanová /El subaj fontoj/, verko de Kamarýt Historio de la Esperanto-Movado en ĈSSR /J.Mařík/, daŭris diskuto pri la esenco de la tradicia kaj moderna poezio, literatura lingvo kaj stilo en esperanto, problemoj de la faka esperanta stilo en scienco kaj tekniko /Ing. Chrdle/, pliprofundigis programo de venonta renkontigo kun lingvofakuloj, oni diskutis pri la eldonita literatura suplemento Kvarfolio.

La agado de la literatura sekcio, bedaŭrinde, limiĝas je praĝaj esperantistoj kaj nur sporade alvenas eksterĉefurbanoj. Aparte ni volus danki al Ing. Margit Turková, redaktoro de la revuo Paco, kiu regule partoprenis la kunvenojn, iniciate donis proponojn kaj ofereme sekurigis eldonadon de la literatura suplemento de Paco. Periode gastas ankaŭ d-ro Hradil kaj s-ano J.Laube el Roudnice n. Labem.

En la jaro 1986 ni koncentras la atenton al Esperanto kiel literatura lingvo, lingvo kaj stilo /J.Rumler/, en marto ni aranĝis konferencon kun lingvistoj kaj elektitaj esperantistoj. La menciitan renkontigon ofereme prizorgis d-ro S.Heřman. Montriĝis esenca ŝanĝo en la ĝisnuna negativa rilato de lingvosciencistoj al Esperanto kaj la ĉeestintaj verkistoj-esperantistoj pruvigis la kapablecon de Esperanto esprimi eĉ la plej emocie diferencigitajn sentojn /Lasta ĉevalo far J.Rumler/. Ni okupigis pri eksterlanda eĥo de niaj publikaĵoj, precipe Kvarfolio, kaj ni gajnis vere internaciajn laŭrojn en la literatur-kritika revuo Literatura Foiro. La ĉeĥa literatura skolo ĉi tie aperas kiel respektata fakto.

En resumcela kunveno en junio 1986 ni okupigis pri analizo de la verkoj de niaj aŭtoroj, eldonitej eksterlande: E.Urbanová, Verso kaj lermo /Iltis/; K.Fiĉ, Obsedo /Iltis/; J.Karen, Flugilhava stono /Fonto/.

Ĉiuj kunvenoj inkludis ankaŭ meditojn pri konkretigo de es-tontaj programoj. Dufoje nin vizitis eksterlandaj esperantistoj. Eĉ

severe aprezante ni povas diri, ke ni efektiviĝis proksimume 30 kunvenojn kaj entreprenojn, kiujn ĉeestis sume 800 personoj. Iuj unufoje, aliaj plifoje, kelkaj regule.

Ni enketis la ĉeestantojn, kiel ili pritaksas la laboron de la sekcio, kion ili trovas valora. Resume oni povas diri, ke oni bon-pritaksas: enhavan plenecon kaj celkonscian pricerbumon de la pro-gramo, valoran enhavon, plue tion, ke la kunvenoj okazas ĉiujare regule minimume sesfoje, ankaŭ la ĉeesto estas regula, ke esprime altpretendajn kaj komplikajn literaturajn problemojn oni uzas Esperanton, ke disvolviĝas kreado de la sekcianoj kaj la menciitan kreadon oni disvastigas enmenden per publikaĵoj.

Ni emus danki s. Šunová kaj precipe s. Krištofová pro valora oferema laboro per prizorgo de la ĉeesto, de nomlistoj, kunvenĉam-bro kaj prikunvenaj protokoloj. Dankon meritas ankaŭ s. Ševčík kaj anoj de la Esperantista Klubo en Praha, kiuj al ni disponigis por kunvenado sian klubejon en la strato Vejvodova kaj pacience hejtadis, ordigadis ktp.

Riproĉindas eta intereso de esperantistoj pri literaturo, speciale poezio, superregas intereso pri problemoj de prozo kaj ĉefe pri renkontigoj kun literaturaj personuloj.

#### Publikiga aktiveco de la membroj de la literatura sekcio de ĈEA:

- a/ libroforme: K. Píř: Litomiřla tombejo. Romano. Iltis, FRG  
K. Píř: Obsedó. Poemaro. Iltis, FR Germanio  
E. Urbanová: El subaj fonĉtoj. Poemaro. ĈEA  
J. Karen: Flugilhava ŝtono - elektitaj poemoj. Fonto, Brazilo - tradukis J. Kořínek  
J. Rumler aranĝis la suplementon de Paco: En la koro de Eŭropo  
E. Urbanová elektis kaj aranĝis suplementon de Paco: Kvarfolio  
J. Karen en kunlaboro kun J. Vondroušek eldonis: Poeto ne mortas. Malgranda antologio el verkaro de Merithava Artisto d-ro Frant. Kořík  
J. Rumler: Abunde kaj redunde. Eseo pri diversaj stiloj en la internacia lingvo. Eldonita kiel suplemento de Paco.  
Por la estonta jaro preparas J. Karen kun J. Vondroušek: "Karel Ĉapek, fenomeno universale homa", en kunlaboro kun Societo de K. Ĉapek. La manuskripto jam estas eldonpreta.  
Ing. ĉestmír Vidman preparis sinoniman vortaron por la jaro 1986.  
Jaroslav Mařík preparis la ĉeĥoslovakian parton de "Kiu kiam? Interlingvistika memorkalendaro" /1887-1987/, kun ĉ. 450 nomoj kaj gravaj okazintaĵoj de la Movado; eldonota de Iltis /FRG/, 1987.  
b/ en revuoj: En la brazila eldonejo Fonto aperis poemaro far M. Procházková "Sur la sojlo de la amo", esperantigis J. Kořínek.  
Tradukoj de niaj membroj J. Kořínek, E. Urbanová, A. Stanura, J. Karen el la ĉeĥa literaturo multnombros - ilia registrado en la revuo Paco - ĉeĥa eldono - okupas sufiĉe da loko. Same kvantas kontribuajoj de E. Urbanová, J. Kořínek kaj J. Karen /speciale de J. Kořínek - tradukoj/, J. Rumler en la literatura revuo Fonto, eldonata en Brazilo, tradukoj de J. Mařík en Fonto, Hungara vivo, artikoloj en Paco /ĉs. eId./, Budapeřta Informilo, historia eseo en Heroldo de Esperanto; ĉeĥe en Naše rodina, Jiskra /Benešov/. Multaj aliaj artikoloj kaj poemoj aperis ankaŭ en aliaj esperantaj



ĵurnaloj, sed la aŭtoroj, bedaŭrinde, ne alsendis precizajn datojn.

En la ĉefaj gazetaraj publikigis artikolojn pri Esperanto J. Karen /en Výběr nových knih/, multajn artikolojn en Mladý Svět kaj ankaŭ en la revuo Tvorba /literatura suplemento Kmen/, Mařík en Květy. Domage, ke pri propago de Esperanto en la literaturo neokupigas pluaj membroj samintense kaj samsukcese kiel Eli Urbanová, kiu en kunlaboro kun K. Kyr publikigis serion da diskutoj pri sia laboro en renomaj ĉefaj ĵurnaloj /Svobodné Slovo k.a./

La artiliteratur-sekciaĵoj ĉeestis per siaj kontribuajoj gravajn entreprenojn kiel ekzemple internacian renkontigon en Pardubice, la universalajn kongresojn en Luzern, Stockholm, Budapeŝto kaj Augsburg. Mencion meritas renkontigo kun ĉefaj lingvistoj kaj plue arta vespero: K. Čapek kaj Esperanto, aranĝita de Societo de K. Čapek kun ĉeesto de Merithava Artisto Fr. Kožík, J. Vondroušek kaj J. Karen. La Societo de K. Čapek pritraktis Esperanton en sia bulteno. Kelkaj sekciaĵoj ĉeestis ankaŭ en la festivalo Bezručova Opeva.

Originalan kaj esperantigitan poezion en literaturaj konkursoj bonkvalite reprezentas Eli Urbánová kaj Jiří Kořínek.

Menciindas ankaŭ korespondagado de la sekcio kun multnombraj ĉefaj institucioj, eksterlandaj organizoj kaj ĉefe kun anoj de EVA /Esperantlingva Verkista Asocio/, kun ĉiuj membraj revuoj.

Ni volus ankaŭ esprimi dankojn al s-ano Mařík, kiu havigis al ni valorajn materialojn. /E-igis T. Krištofová/

---

# el esperantujo

---

## Internacia Metodika Seminario

Okazis jam kvar IMS: la 1-a kaj 2-a en Pollando (1983 kaj 1985), la 3-a en GDR (decembre 1985) kaj la 4-a en Hungario (1986). La 4-an IMS partoprenis 60 personoj el 9 landoj: BG, ĈS, FRG, GDR, H, I, NZ, PL kaj SU. La kadrotemo de tiu IMS estis: Instruhelpiloj en la fremdlingvo-instruado. kun aparta konsidero al Esperanto. Kun prelegoj kaj prezentoj elpasis 21 instruistoj/kursgvidantoj, kelkaj el ili eĉ dufoje, t.e. entute 28 kontribuajoj konsistigis la fakon programon.

- Jen la prelegoj en laŭtema grupigo: enkonduka prelego pri la kadrotemo: Dr. Szerdahelyi I.: Kion signifas "demonstrado" en la didaktiko?
- Pri diversaj informaj-portantoj:
  - Barcsay Zsuzsa: Instruohoro kun aŭd-vida kasedo
  - Velösy Klára: Enciklopediaj tabuloj
  - Kolorilustrita porinfana lernolibro-projekto
- Behrmann, H.: Bild- kaj sommaterialo de la "Lingvoorientiga instruado" por 3-4-aj klasanoj
- Sebián-Szöcs Ágnes: Memfaritaj pupoj por 3-4-a-klasanoj
- Jodasová, Pavla: Paroligaj bildoj
- Soos Károly: Posmagnetofono en la lingvolernado
- Bognár Ágnes: Gazet-eltondaĵoj
- Kiss Orsika: Memfaritaj demonstriloj flanelaj kaj paperaj
- Pri komputilo:
  - Koutny Ilona: Rolo de komputilo en la instruado de fremdlingvoj
- Didaktikaj ludoj, humuro:
  - Janeva, Rumjana: Didaktiko de la ludo. Gramatikaj ludoj

Hompasz-Horváth Judit: Kolektaĵo de lingvaj ludoj de Szopori-Szabó Piroška

Faragó Katalin: Serioze kaj gaje - helpe de ludoj

MacGill, Stefan: Instrue humure. Skecoj

- Evoluigo de parolkapablo per kreo de situacioj:

Jodasová, Pavla: Metodoj de paroligo de lernantoj

Koutny Ilona: Dumkongresaj konversaciaj kursoj

- Evoluigo de parolkapablo per lingvistikaj rimedoj:

Szanser, Irena: Evoluigo de parolkapablo. Teorio kaj praktiko

- Konsciigo pri la lingva strukturo:

Szanser, Irena: Mediatoroj en la instruado de fremdaj lingvoj - funkcio kaj uzo (kun ekzemploj)

Szedmák Károly: Gramatikaj tabeloj de E-o, kompilendaj dum la kurso, fare de la glernantoj

Gyenes Sándor: Grada kaj varia kreado de kompleksa frazo el simplaj elementoj

- Pedagogiaj skoloj:

Farkas-Tatár Éva: Demonstrilaro de la Cseh-metodo

Oleszek, Halina: Informoj pri Freinet-konferenco 1987

- Plialtigo de generala klereco kaj estetika edukado en instrueroj de fremdaj lingvoj:

Dr. Dahlenburg, T.: Pedagogia valoro de literatura-lingva komparado (diversaj tradukoj de Lermontov: Parus)

Dr. Dahlenburg, T.: Kiel plialtiigi samtempe la lingvajn spertojn de talentuloj kaj la lernemon de maldiligentuloj? (per generalkleriga kompletiga materialo)

Post la prelegoj kaj dum la paŭzoj okazis diskutoj, spert-interŝanĝoj.

La fakan programon gvidis Dr. Szerdahelyi kaj Barcsay Zs.

Elformigis unueca opinio pri tio, ke unuflanke estus necese havi multe pli da specoj da demnstriloj, ol estas acetebblaj/akireblaj en la merkato; aliflanke ĉiuj helpiloj farigas efikaj nur sub aplikado de instruistoj kun alta faka kvalifiko, kun respektinda homa karaktero, laborantoj kun pedagogia destino. La informaj-portantoj kaj aparatoj estas nur helpiloj, kiuj neniam povas anstataŭi la homon.

La 5-an DMS aranĝis Bulgara Esperantista Asocio en aprilo 1987 en Pisanica.

(Lau raporto de Dr. Szerdahelyi István kaj Barcsay Zsuzsa)

### Internacia Literatura Forumo

La 5-a ILF de Internacia Komitato por Honoro al Kolomano Kalocsay okazis en la naskiĝurbo de Kalocsay - Abaujszánto.

La ceftemo de la tria tago estis la solena inaŭguro de la bronza busto de Kalocsay, kies kreinto estas Zsolt Józsay, juna skulptisto el Miskolc.

La festo komencigis en kulturdomo Sándor Petőfi, kie oni aranĝis belan kulturenan programon. La dua parto de la festo estis daurigata en carma parko, kie en solena silento d-ro Vilmos Sághy, Antalné Komjáti kaj Gábor Bényey, lokaj urbogvidantoj, inaŭguris la brozan buston, kiun starigis la logantaro de Abaujszánto omage al sia granda esperantista filo. Ili estas fieraj, ĉar tiu Kalocsay-skulptaĵo estas guste en lia naskiĝurbo starigita kaj ĉefe unua en la mondo! La prezidanto de HEA d-ro V. Sághy diris festan parolon, gratulinte al la logantaro de Abaujszánto, kiu tiel bele kaj inde rememoris pri Kalocsay. En la festparolo li alvokis la esperantistaron, ke ĉiu en sia vivo vizitu unufoje la urbeton Abaujszánto por honori je memoro de Kalocsay. En la nomo de ILF festparolis d-ro Giorgio Silfer, poste sekvis la florkronado.

En la tria parto de la festo, kiu estis daurigata en la lokhistoria muzeo, oni inaŭguris la Kalocsay-reliefon el bronzo, kiu figuras la maljunan Kalocsay. Tiun reliefon kreis la amatora artisto Gábor Bényey. Poste ĉiuj vizitis la memorcambron kaj relikvojn.

La kvara festoloko estis la strato Kalocsay, kie oni florkronis la memortabulon,

kiun oni surmetis en inaŭgura jaro 1982.

Poste sekvis la festkunsido de la ILF. D-ro Silber resumis la okazintaĵojn, parolis pri la esenco de prelegoj de antaŭaj tagoj, kies temo estis: Kolmano Kalocsay, ĉu la Danto de Esperanto? Ĉi tie oni anoncis, ke la premion "La verko de la jaro" ganis "La monto" de István Némere. Per tio estis fermita la Internacia Forumo.  
(Laŭ Lukács Gusztav)



La festparolado  
dum la solena inaŭguro

Floroj por aŭtoro



Sur la koverto: La busto de Kalocsay, farita de Zsolt Józsay



La 29-an de aprilo finiĝis solene la vesperaj kursoj de Esperanto en Prago. Per sukcesaj ekzamenoj finis la kurson por komencantoj 23 lernantoj, por progresantoj 20. Instruis prof. dr. Horský kaj H. Štruncová. Komence de oktobro planas EK Prago lanĉi novajn kursojn.

## Internacia Literatura Konkurso

La 3-an de decembro 1986-a kunsidis la membroj de la Patronaro de Fundación Esperanto. Post trasto de la ricevitaj informoj oni sciigis la rezulton de la Internacia Literatura Konkurso.

Premio "Sancho Rebullida" estas aljuĝita al la konkursaĵo "La sonorilo de Van Willem", subskribita de Willems.

Subpremio "Sancho Rebullida" estas aljuĝita al la konkursaĵo "Fabelo el la insulo Ré: La Sorcistinoj", subskribita de Konigbän.

Tuj poste estis malfermitaj la identigaj kovertoj, kaj la aŭtoroj premiitaj estas: Francisko Ksavero Moleono (Rotterdam, NL); premio "Sancho Rebullida", Fernard Aunis (Strasbourg, F); subpremio "Sancho Rebullida".

La Patronaro de Fundación Esperanto, Zaragoza, dankas al la partoprenintoj pro ilia entuziasma klopodo viviĝi Esperantan per siaj verkoj.

## Donaco okaze de la jubilea jaro

La sekretariejo de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) komence de la jubilea jaro de Esperanto ricevis novan oficejon kun 6 cambroj. La novaj elstaraj eĵaj kondiĉoj certe influos la laboron de la asocio pozitive. La sola posta adreso estas: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, DDR-1080. La oficejo mem troviĝas en: Friedrichstr. 120, Berlin, 1040. Ni elkore gratulas al niaj germanaj samideanoj.

## Esperanto-elsendoj el Nederlando

Esperantistoj el Nederlando deziras fari radio-elsendojn en kaj pri Esperanto. La unua elsendo okazis la 20-an de marto de 19.30 ĝis 20.00 horo.

La radiostacio nomigas "La stata radio", ĉar ĝi troviĝas en la kvartalo de statistoj. La stata radio estas libera radio (103.4 FM) sen reklamo. Oni satas elsendi ĉiusemajne vendrede.

Kiu povas helpi per diversaj novaĵoj, aktualaj temoj kaj muziko en Esperanto, tiu skribu al la stata radio, Esperanto-redakcio, postkasto 14521, 1001 LA Amsterdamo, Nederlando.

## Nova Biologia Nomenklature

La 22-an kaj la 23-an de aŭgusto 1986 en la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds (Svislando) okazis seminario pri Nova Biologia Nomenklature (NBN).

Ĝis nun 104 NBN-nomoj (5 listoj) estas validigitaj, t.e. aprobitaj de komisionoj konsistantaj el tri biologoj. Plie, 13 listoj atendas aprobigon kaj pri 6 listoj oni povas atendi ke ili baldaŭ estos pretaj por aprobigoj.

En la komisionoj por aprobo de listoj de ordoj de mamuloj kaj familioj de primatoj laboris membro de scienc-teĥnika sekcio de ĈEA s-ano Lubomír Štěda.

## Entomologio

Al multaj objektoj ĝis nun honoritaj per nomado laŭ Esperanto, aldonigis iu ĉina skarabespecio "Cergithus esperanto". Kiel distingan markon ĝi posedas kvin verdajn punktojn, arangitajn stelforme. Anglalingva priskribo troveblas sur p. 138 de Economic Insect Fauna of China, Science Press, Beijing, 1985, kaj ĉinlingva sur p. 122 de la sama eldono.

Respondacas pri la nomo de tiu specio la veterana ĉina esperantisto kaj entomologo Io Chou, profesoro ĉe Nordokcidenta Agrokultura Universitato en Ŝaanxi-provinco. La loka Yangling-a E-Asocio aperigis pasintjare Esperantan verkon de prof. Chou "Ĉinio Marŝas en Insekta Mondo". Yangling estas efektive konata en Ĉinio pro ĝia koncentriĝo de agrokulturaj institutoj kaj universitatoj.

## Monumenta verko pri likenoj

En Francio aperis nova originala Esperanta libro "Like. 1 de Okcidenta Eŭropo. Ilustrita Determinlibro," de G. Clauzade kaj C. Roux. La libro konstituas ilon por determini entute ĉ. 330 genrojn kaj 5000 speciojn de okcidenteŭropaj likenoj. La aŭtoroj kritike reviziis la taksonomion (sistematikon) de la likenoj, starigante novajn taksonojn (t.e. genroj kaj specioj) el kiuj genro (kun tri specioj) ricevis la nomon "Zamenhofia"; plue ili ŝanĝis la nomon de multaj specioj konforme al la internaciaj botanikaj nomenklaturreguloj kaj laŭ la konceptoj de la aŭtoroj pri la sistematiko de la likenoj. ("Esperanto")

(Pri eldona aktivado de la membroj de Artliteratura sekcio)

### 1. NIAJ AŬTOROJ SIN PREZENTAS AL VI

Almanaketo poezia, 1980. Poemoj kaj bibliografiaj notoj pri aŭtoroj konataj en la Esperanto-literaturo kaj en la ĉeĥa literaturo: Zdeněk Bár (jam forpasinta), Jiří Karen, Jiří Kořínek, František Lazecký (forpasinta), František Kožík, Josef Rumler, Eli Urbanová, Čestmír Vidman, Val. Vinař (forpasinta), Karolo Píč.

### 2. ESPERANTAJ VERKOJ FAR ĈEĤAJ AŬTOROJ

Bibliografio 1890 - 1980. Kompleta informo por informi neinformitan publikon pri literatura agado de ĉeĥaj Esperanto-verkistoj kaj tradukistoj.

### 3. EN LA KORO DE EŬROPO

La verketo enhavas: Komenio - prapatro de la internacilingva ideeo. Nuntempaj ĉeĥaj poetoj kaj prozistoj aktivaj en Esperanto-movado. Mesaĝo de nacia artisto St. K. Neumann. Poezio kaj prozo - la du aspektoj de la sama lingva problemaro. El la spertoj de la naciilingva poezio. František Kožík. Fragmentoj. El rememoroj de nacia artisto Karel Höger. Jiří Karen - poemoj originale verkitaj. Karel Čapek (fragmento). Jaroslav Hašek. Fragmento el Brava soldato Svejk. F. X. Salda. Julius Fučík. Karel Hynek Mácha. Jan Neruda. Jar. Vrchlický. O. Březina. P. Bezruč. Fr. Halas. V. Nezval. (Fragmentoj). Pri la ĉeĥaj tradukistoj: S. Schulhof, R. Hromada, T. Pumpr, J. Kořínek. La verkistoj originale verkantaj en Esperanto: Eli Urbanová, Karolo Píč, Jiří Kořínek. La verkistoj konataj en la ĉeĥa literaturo: Jiří Karen, Josef Rumler, Jaroslav Seifert, Karolo Píč, Josef Kainar. Prozo art-literatura: J. Vondroušek, O. Kníchal, V. Vinař, VI. Novobilský. Dram-aktorino Eva Seemánová. La verketon redaktis, verkis kaj parte tradukis Josef Rumler.

### 4. POETO NE MORTAS

Antologieto el la verkaro de František Kožík. Enhavo: Persona mesaĝo de la artisto al legantoj. Poemo: Vestu min bunte. Fragmentoj el La plej granda el pierotoj, La poeto ne mortas, Frenezulojn nutras dio, Josef Mánes, La rentgenbildo de la koro: normala, Sur la herbokovrita irvojeto, La urbo de feliĉaj amoj, Panfaroj por la reĝo, Sur alo de ventmuelejo. Pri merita artisto Fr. Kožík. Redaktis kaj tradukis Jiří Karen kunlabore kun Josef Vondroušek.

### 5. KVARFOLIO

Versoj de pragaj poetoj-esperantistoj: J. Karen, E. Urbanová, Č. Vidman, J. Rumler. Enhavo: Ĉeĥlingva poeto Jiří Karen. Elĉeĥa poezia tradukisto Jiří Kořínek. Poemoj de J. Karen en traduko de J. Kořínek. Poezia ventumilo de Eli Urbanová. E. Urbanová en datoj. Pri Rumler kaj lia lasta ĉevalo. J. Rumler: Lasta ĉevalo. Poemego. Č. Vidman: Japanaj motivoj. Margene de la japaneskajoj de Č. Vidman. Letero al komencantaj poetoj. Redaktis Eli Urbanová.

Jiří Karen

# KONVERSACIO por progresintoj



Nova temo: UNIVERSO

Dumtage estas super kapoj de homoj blua firmamento kaj la suno brilas sur ĝi. Rekte en la sunon oni povas rigardi nur baldau mate-  
ne au vespere. Sur la firmamento ofte estas ankaŭ nuboj blankaj,  
grizaj au nigraj en diversaj formoj. Ili estas vaporoj au akveroj.  
La suno per sia brilado vaporigis la akvon el maroj kaj lagoj, ĝi  
iris supren kaj kondensiĝis al akveroj. La nuboj ŝvebas per vento,  
iam el ili pluvas. Se samtempe brilas la suno, aperas sur la firma-  
mento sepkolor- au ĉiel-arko. Dumnokte estas la firmamento nigra  
kaj sur ĝi fulmetas multegaj steloj. Ili formas stelfigurojn, kiujn  
niaj prauloj poezie nomis: Granda Ĉaro, Granda Urso, Virgulino, Zo-  
diako, Kaprikorno, Suda Kruco kaj aliaj. Krom steloj estas sur fir-  
mamento luno. Dum proksimume unu monato oni povas vidi unuan kvaron-  
lunon, plenlunon, lastan kvaronlunon kaj novlunon. Ĉion oni ja vi-  
das nur, se la firmamento ne estas nubokovrita. La firmamento aspek-  
tas kiel volbajo, kiu tuŝas platan teron en cirkonferenco, kiu nomi-  
ĝas horizonto. La horizonto malproksimiĝas, se oni iras al ĝi au  
supre. La prauloj supozis, ke super la firmamento estas ĉielo, kie  
rezidencas dio kaj anĝeloj.

Fakte la firmamento ne ekzistas. Super la tero estas aero, tra  
tiu aero oni rigardas en la universon au kosmon. La steloj, kiuj  
estas dumnokte videblaj, estas similaj al la suno, sed la granda  
distanco sekvigas, ke ili estas kvazau fulmetaj punktoj. La tero,  
sur kiu homoj vivas, ne estas plata, sed ĝi havas formon de globo.  
Tiu terglobo rotacias ĉirkaŭ sia akso, tial estas hela tago kaj mal-  
hela nokto. Krome la Tero cirkulas ĉirkaŭ la Suno en preskaŭ cirkon-  
ferenca orbito. La Terglobo estas planedo de la Suno kiel ceteraj:  
Merkuro, Venuso, Marso, Jupitero, Saturno, Urano, Neptuno, Pluto.  
Ili estas diverse grandaj kaj distancaj for de la Suno. Kelkaj pla-  
nedoj havas satelitojn kaj trabantojn, kiuj cirkulas ĉirkaŭ ili. La  
satelito de nia Tero estas la Luno. Ankoraŭ cirkulas ĉirkaŭ la Suno  
planetoidoj, kometoj kun vosto kaj meteorŝtonoj au aerolitoj. La  
tuto nomiĝas planeda suna sistemo. Suno, Luno, Terglobo, ceteraj pla-  
nedoj, kometoj, aerolitoj, metepro, kosmaj radioj, aliaj steloj,  
kosma polvo, kosma gaso, nebulaĵoj kaj aliaj fenomenoj nomiĝas sume  
astroj kaj la scienco estas astronomio. La distancoj kaj dimensioj  
de astroj estas grandegaj, sed diferencaj. Oni mezuras ilin en lum-  
jaroj. Unu lumjaro estas distanco, kiun trairas la lumo dum unu ja-  
ro. Nome la rapideco de lumo ne estas senfina, kiel konjektis la  
prauloj, sed ĝi estas grandega kaj tial unu lumjaro estas ĉirkaŭ  
dek bilionoj da kilometroj. Parseko estas trioble pli granda, ĝi  
estas distanco, el kiu oni vidas linion inter la Tero kaj Suno en

vidangulo de unu sekundo. La tutan sunsistemon traŭiras la lumo dum eble dek tri horoj. Sed la plej proksima stelo estas en distanco de kvar lumjaroj. Tial oni vidas aliajn stelojn nur kiel senmovajn punktojn kaj parolas pri fiksjaj steloj. Movojn kaj planedajn sistemojn oni nur supozas.

Tiuj videblaj astroj apartenas al nia Galaksio. La randon de tiu Galaksio oni vidas sur la nokta firmamento kiel blankan strion. Tial la prauloj nomis ĝin Lakta Vojo. Sed en la universo estas ankoraŭ aliaj galaksioj, kiujn oni vidas kiel nebulaĵojn. Do iam estas nebulaĵoj faktaj gasoj au polvoj en nia Galaksio, iam ili estas aliaj galaksioj tre malproksimaj. Nia Galaksio havas formon de lento, ties longeco estas 30 000 lumjaroj, aliaj dimensioj nur 6000 lumjaroj.

Astronomoj observas astrojn per tele- kaj spektroskopoj. El spektroj, kiuj estas spektroskopaj laboratoriaj formaĵoj, similaj al sepkolorarko en naturo, ili ellegas datojn pri interno de astro. Astronomiaj observatorioj estas en pejzaĝoj, kie estas pura aero, por ke la astraj radioj estu plej malmulte misedesegnitaj.

Astroj en la universo moviĝas pro reciproka gravito. Per sia gravito altiras la Terfglobo ĉion kaj ties esprimo estas la pezo. La homo povas liberiĝi for de la gravito nur per granda rapideco, kiun oni atingis en raketaj motoroj. Tiuj elpuŝas gasojn, kiuj rapide ŝprucas kaj la korpo de la raketo moviĝas en kontraŭa direkto. La gasoj fuzas kaj motoroj atingas grandajn rapidecojn. Oni jam elsendis plurajn artajn satelitojn, eĉ science fantaziaj romanoj oni parolas pri kosmonaŭtoj au astronautoj, kiuj flugas en la universo en kosmaj ŝipoj kaj skafandroj.

Prauloj kredis ankaŭ, ke astroj influas la vivojn de homoj. Tiu teorio nomiĝas astrologio, astrologoj klarigas fenomenojn sur firmamento, precipe eklipsojn de luno au suno, kometojn kaj stelfigurojn kaj skribas horoskopojn. La suno moviĝas sur la firmamento nur ŝajne, oni nomas ties orbiton ekliptiko.


GRAMATIKO: 1. Elektu dek frazojn en la temo kaj enmetu tien novan adverbos. Ekzemplo: trovita frazo: prauloj kredis ankaŭ, ke astroj influas la vivojn de homoj. Tasko: Prauloj firme kredis ankaŭ, ke astroj konsiderinde influas la vivojn de homoj. 2. Trovu verbojn kun sufikso -iĝi kaj klarigu ilin (en frazoj).

STILO: 1. Skribu enhavon de romano au filmo el kosmo, kiun vi legis au vidis. 2. Provu skribi rakonton pri la sunsistemo lau tiuj punktoj: Skalo 1 : 500 000 000, trimetra inkandeska globo, pizero en distanco de 116 m, juglagdo en distanco de 216 m, dua juglando en distanco de 300 m, ĉirkau ĝi pizero en malproksimo de 80 cm, avelo en distanco de 460 m, futbala pilko 1,5 km de la centra globo, ĉirkau ĝi filigranaĵoj ĝis distanco de 4 m, malpli granda pilko en distanco de 3 km kun ringoj, 6 kaj 9 km du orangoj, 25 km de la centro juglando.

DEMANDOJ: 1. Kiun Esperantan romanon au rakonton pri universo au kosmonaŭtoj vi konas? 2. Kiujn stelfigurojn vi konas? Kiujn vi kapablas montri sur la firmamento? 3. Ĉu vi vidis eklipson au almenaŭ legis pri ĝi? 4. Kiel malproksime estas la horizonto? Ĉu ekzistas ia formulo por elkalkuli la distancon de la horizonto? De kio dependas tiu distanco? 5. Nomu gravajn okazaĵojn el historio de kosmaj flugoj. 6. Kial en la temo estas "suno, tero, luno" jen per majusklo, jen per minusklo?

Josef Chvosta





# KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

<p>Korespondi deziras Jarosław Zabłocki, ul. Zawadzkiego 51/2, 65-528 Zielona Góra, Pollando</p>	<p>28-jara muzikisto (ludas fagoton) interesigas pri klasika muziko kaj fremdaj lingvoj (germana, angla). Romuald Świążden, str. Mełgiewska 7/9 m. 59 bl. 1, 20-209 Lublin, Pollando</p>
<p>26-jara bibliotekistino interesigas pri literaturo kaj geografio, posedas Esperanton kaj germanan lingvon. Adreso: Iwona Gzel, ul. Stalingradzka 20 m. 112, 03-468 Warszawa, Pollando</p>	<p>33-jara instruistino pri matematiko en elementa lernejo interesigas pri turismo, muziko kaj literaturo, sia hobbio estas kantado kaj kolektado de elefantoj, ĉar ili alportas felicon. Elżbieta Krawiec, str. Użórowiskowa 2, 70-885 Szczecin, Pollando</p>
<p>Gelernantoj 13-15j. kaj grupo de pli aĝaj komencantaj esp-istoj deziras korespondi kun c.l., intersangi p.m., b.k. kaj E-ajojn. Esperanto-Rondeto, Pałac Młodzieży, ul. Żeromskiego 26, PL-81-346 Gdynia, Pollando</p>	<p>17-jara lernantino dez. kor. en Esper. kun geknaboj pri moderna muziko, turismo, literaturo, si dez. intersangi PM, bildkartojn, mod-revuojn. Małgorzata Kardasz, ul. Olstyńska 1/9, 15-870 Białystok, Pollando</p>
<p>23-jara laboristo interesigas pri sporto, literaturo kaj muziko. Mieczysław Żelkowski, str. M. Keniga 17m47, PL-02-495 Varsovio 125, Pollando</p>	<p>31-jara instruistino interesigas pri turismo, geografio kaj literaturo, kolektas bildkartojn. Mirosława Rogala, str. Dzierżyńskiego 20, 96-500 Sochaczew, Pollando</p>
<p>29-jara oficisto kolektas postmarkojn kaj bildkartojn. Marian Pietrewicz, str. Saperów 18, PL-15-316 Lipsk, Pollando</p>	<p>Kun cs. esperantistoj deziras korespondi Vladimir I. Bondarenko, 349010 CCCP Slavjanoserbak, Vorosilovgradskaja obl. ul. Kirova 105</p>
<p>13-jara Johano ŝatas futbalon kaj sakon, legas multe librojn kaj kolektas postmarkojn. Johano Machało, ul. Nowe Miasto 6, 67-115 Bytom Odrzański, Pollando</p>	<p>Kun esperantistino el Prago deziras korespondi Marcus Krieger, Leninallee 10, 1017 Berlin, DDR</p>
<p>24-jara dentistino interesigas pri turismo, arto, literaturo kaj geografio. Beata Świderska, ul. M. Reja 2, 21-400 Łuków, Pollando</p>	<p>Serioze korespondi pri tridimensia fotografado kaj proksima (makro)fotografado, pri orkideoj kaj papilioj deziras Anton Blickman, Palamedesstraat 17, 2026 VV Haarlem, Nederlando</p>
<p>32-jarulino interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro. Zofia Kwiatkowska, Belny, 62-610 Sompolno, Pollando</p>	<p>Interesigas pri folkloro, muziko kaj hungaraj popoldancoj, ŝatas historion, geografion kaj biologion Maria Isabel Santos Oliveira, Rua Conego José Bento n-o 727, Jacareí - SP - Brasil, Brazilo (si estas instruistino, fraulino, 40j.)</p>
<p>27-jara manlaboristo interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas bildkartojn. Wiesław Wojdyłak, str. Wybrzeże Kosciuszki 36/10, 37-700 Przemysł, Pollando</p>	
<p>27-jara frajlo dez. korespondi kun gesamanoj pri c.t. Przemysław Jankiewicz, skr. poczt. 60, 63-400 Ostrów Wlkp. 1, Pollando</p>	

<p>24-jara fraŭlino, kalkulisto, interesigas pri folkloro, muziko kaj popoldancoj, sata historion, geografion kaj biologion. Isis Ferreira Prado, Rua Cornélio Pereira da Silva 54, Jacareí - SP - Brasil, Brazilo.</p>	<p>Karaj Samideanoj! Ĉu Vi povus helpi al ni, esperantistoj el urbo Gliwice (PL) trovi esperantistojn en urboj Olomouc (CS), Doncaster (Britujo) kaj Dessau (GDR). Antaŭ kelkaj jaroj niaj urbaj konsilantaroj subskribis interkonsentojn por kultura kaj scienca kunlaboro, intersango de grupoj kaj spertoj. La kunlaboro disvolvigas kaj progresas. Ni esperantistoj volus fari la samon kun niaj samideanoj. Tial ni serĉas la volontulojn, kiuj respon- dos al ni. Bv. skribi al Polski Związek Esperantystów, oddział w Gliwicach, Skr. pocztowa 21, 44-101 Gliwice, Pollando aŭ al la prezidanto de la filio de FEA en Gliwice Stanisław Mandrak, ul. Kormoranów nr 39/16, 44-114 Gliwice, Poll.</p>
<p>Korespondi deziras jenaj brazilanoj: Rodolfo Blumini, Caixa Postal 42031, 0a073 - São Paulo - SP - Brasil</p>	
<p>Marcelo Nogueira, Rua Marcos Azevedo 45, Ap. 12 - Pinheiros, São Paulo - SP - Brasil</p>	
<p>Sérgio Antônio Gibelati, Rua Januário Boccia 290, Jardim Itapeva, Mauá - SP - Brasil</p>	
<p>Rosana Vasques, Rua Julião Ferreira da Silva 435, Vila Nova Cachoeirinha 02882, São Paulo - Brasil</p>	<p>18-jara junulo satas legi romanojn, pre- cipe detektivajn, ludas futbalon, auskul- tag muzikon, spektas filmojn, satas vo- jagadon. Korespondas anglalingve! Brima Claudio Sankoh, N° 9 Nicol Street, Via New England Ville, FREETOWN, Republic of Sierra Leone, West Africa</p>
<p>Luiz Carlos Destro, Rua Manuel de Paiva 313, Vila Mariana 04106, São Paulo - Brasil (pri afero Okultismo)</p>	
<p>Emanuel Zanichelli, Rua Aristodemus Gazziti 261, Vila das Belezas - São Paulo - SP - Brasil</p>	<p>Sovetiaĝ gelernantoj deziras korespondi kun geknaboj el diversaj landoj, sed nur rusingve! Skribu al: Gennadij Ivanoviĉ Motcev, 326866 s. Novokairy, Bereslav- skij rajon, Ĥersonskaja obl., USSR</p>
<p>Manuela Lombardi, Rua Horácio Serosoppi 204, 02301 - São Paulo - Brasil (inter- ŝangas bildkartojn)</p>	
<p>Regina Célia Mendes, Rua Julião Ferreira da Silva 435, Vila Nova Cachoeirinha - 02882 - São Paulo - Brasil (pri la ideo de Dio en nia lando)</p>	<p>Polaj lernejanoj satus lerni Esperanton, sed dume korespondas nur en la lingvoj pola, rusa kaj franca. Skribu al Ryducha Ryszard, ul. 1000 lecia P. P. 15/20, 16-200 Dąbrowa Białostocka, Woj. biało- stockie, Polaka</p>
<p>Denisia Aparecida De Moraes, Rua Afonso Lopes Vieira 83, Vila Dionisia - Bairro da Cachoeirinha São Paulo - Brasil</p>	

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉe- ĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika arango), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al presejo 30. 5. 1987. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 MLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnigu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redak- tor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne RUCH Liberec. Předáno do tisku 30. 5. 1987. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

# KDS

## sedlčany

NOŽÍŘSKÉ VÝROBNÍ DRUŽSTVO \*

**MNOHO POTŘEBNÉHO  
PRO DOMÁCNOST**

Kuchyňské nože v širokém výběru pro každý účel, různé soupravy dárkového charakteru včetně stolovacích souprav různých typů

Kuchyňské náčiní: vidličky, otvírače konzerv a korunkových uzávěrů, jehly na masové závítky, sekáčky a polosakáčky na maso apod.

Manikurní náčiní: záděrkové nůžky rovné i ohnuté v moderní tvarovém provedení, nehtové nůžky rovné i ohnuté, pilničky na nehty, malé manikurní soupravy

Pedikurní náčiní: kleště na nehty, štipky na kůžičku, rašpličky na tvrdou kůži

Nůžky k různému účelu a v různém provedení

**TVAR**  
**v.d.**

**JÄGERMANNOVA 1682**  
**530 03 PARDUBICE**

- Je monopolním výrobcem sportovních ochranných přileb značky CASSIDA
- Mále vyrábí drobné výrobky z plastických hmot určených pro domácnost a pánskou vycházkovou obuv
- provádí instalaci kovového těsnění do oken a dveří a to jak pro soukromníky tak i pro socialistický sektor
- provádí opravy hodinek, obuvi a provádí mandlovaní prádla



**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**

**Dohlédací pošta Praha 07**  
**Snížený poštovní poplatek povolen**  
**Ředitelstvím pošt Praha**  
**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**